

Num ankaŭ en ePub formato!



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Oktobro 2018 n-ro: 34



Merhaba,

Yaz bitti, kış yaklaşıyor, iki ay sonra bir yılı daha bitirmiş olacağız.

Bu sayıda birbirinden ilginç yazılar arasından tavsiye edeceğim birisi, Arnavutluk'tan Bardhyl Selimi'nin gönderdiği merhum Aziz Nesin hakkında bir hikaye. Ünlü yazar ve gazetecinin mizahına uygun başından geçen gerçek bir olay.

Benim için başka ilginç bir yazı, yüzyıllar boyunca, hatta Osmanlı imparatorluğunun sonuna dek İstanbulu adını vermiş Bizans kralı Konstantin hakkında Renato Corsetti'nin bir yazısı.

Bunların dışında Kasım sayımızda okunmaya değer irili ufaklı bir çok yazı tarafınızdan okunmayı bekliyor.

Hepinize iyi okumalar!

Saluton,

La somero jam pasis, vintro alproksimiĝas, kaj post du monatoj ni finos unu tutan alian jaron.

En ĉi tiu numero de nia revuo inter la interesaj artikoloj, iu, kiun mi ankaŭ sugestus estas rakonto sendita de Bardhyl Selimi el Albanujo pri la jm forpasita, fama turka verkisto kaj ĵurnalisto Aziz Nesin. Ĝi estas humura travivaĝo de Aziz Nesin ĝuste tiel, kiel liaj humuraj verkaĵoj.

Por mi iu alia interesa artikolo estas tiu de Renato Corsetti, pri reĝo Konstanteno, kiu donis sian nomon al urbo Istanbul dum multaj jarcentoj eĉ ĝis la fino de la Osmana imperio.

Krom tiuj, en nia novembra numero ekzistas multaj aliaj artikoloj de diversaj larĝejoj, kiuj indas esti legotaj de vi.

Bonan legadon al ĉiuj!

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO
 Eldonanto : Turka esperantistaro
 Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Anoncoj	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
La unua UK en Portugalio	4
Lisbono	5
La Vesperto	5
PITONO/APOLONO kaj DAFNA	6
La Fano	8
El la libro de "Dao de Jing" (26)	10
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 5)	11
Al Vi	12
SOLECO	12
Ŝercoj	13
Kurcvortenigmo	13
Aziz Nesin en Albanio	14
Serenaj Matenoj	14
EKRA 2018	15
En la lumo de la ekmiroj	16
Mallonga Historio de Filozofio (33)	17
La Vundo	18
La maro de la lingvoj	19
Televideo parolisto	19
Kelkaj pensoj pri UK kaj IJK 2018	20
Esperanto lingvo ne facila por ĉinoj	22
GERSI - Mia amiko el Brazilo	23
Serĉantaj Animoj	23
Pri la amikeco inter hundo kaj lupoj	24
La sorĉita ladskatolo	25
RITE - kio ĝi estas	26
Intervjuo kun la unua diplomito de RITE	26
Konstanteno:	
ĉu vere granda kristana imperiestro?	28
La ludpilko de la universo	29
Facilaj rakontoj	32
La 12-a MONA Kunveno	32
Solvo de la Krucvortenigmo	32

Kursoj



Pro la somera sezono nun estas neniu aktiva Esperanto kurso en Turkujo.

Internacia tago de paco



Eŭropa tago de lingvoj



104-a UK en Lahti



AŬTUNE

AŬtuna **TU**multa **NE**sto 7-a komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj de sabato, 27-a de oktobro, 18h ĝis dimanĉo, 4-a de novembro 2018 matene. Kursoj, ĥoro Interkant kaj aliaj aktivaĵoj, programo por adoleskantoj kaj por infanoj. Bonvolu klaki sur: <http://gresillon.org/autune>



Berto Suman

Bonvenon en la franca Esperanto-kastelo Gresillon en F-49150 Baugé, okcidente de Parizo

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La septembra Esperanto-Sumoo

Partoprenantoj: 336 el 31 landoj

La unuaj dek landoj laŭ la nombro de partoprenantoj:

1. **Japanio:** 73
2. **Koreio:** 47
3. **Brazilo:** 32
4. **Francio:** 29
5. **Ĉinio:** 21
6. **Pollando:** 16
7. **Svisujo:** 13
8. **Rusio:** 11
9. **Vjetnamio:** 10
10. **Italio:** 8

Perfektaj venkintoj (15 venkoj):
293 el 236 (87,2%)

Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol 20.000 paĝoj (averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la Sumoo)

HORI Jasuo (s-ro)

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>


Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 755 (2018-09-05)

UEA invitas al kunfestado de la Eŭropa Tago de Lingvoj

Ekde 2001, la Konsilio de Eŭropo kaj ĝiaj 47 membroŝtatoj festas, la 26-an de septembro, la Eŭropan Tagon de Lingvoj, kies ĝeneralaj celoj estas [...]

N-ro 754 (2018-08-29)

UEA alvokas partopreni en EU-enketo pri multlingveco

Eŭropa Unio estas la plej multlingva el ĉiuj internaciaj organizaĵoj, kun 28 membroŝtatoj, 24 oficialaj lingvoj kaj pli ol 500 milionoj da civitanoj. La multlingveco estas tamen ofte ne plene respektata en la oficiala praktiko de EU, kie ofte superregas la plej grandaj lingvoj kaj precipe la angla lingvo [...]

N-ro 753 (2018-08-24)

Biblioteka Apogo Bachrich: subvencipetoj atendataj

Jam la kvinan fojon UEA disdonos subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich (mallonge nomata Biblioteka Apogo Bachrich) por helpi pliriĉigi kolektojn de Esperanto-bibliotekoj [...]

N-ro 752 (2018-08-22)

UEA serĉas organizon-sponsoron de Unesko-Kuriero

Unesko-Kuriero estas eldonata kvarfoje jare de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). Ĝi antaŭenigas la idealojn de Unesko, publikigante informajn materialojn pri internacie gravaj temoj. [...]

TEJO



Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo

Kadre de la Eŭropa Volontula Servo, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de la organizo, sed estas samtempe... [...]

Granda sukceso de la IJK 2018 en Badajoz

Pli ol 250 esperantistoj el la tuta mondo kunvenis por la 74-a Internacia Junulara Kongreso – IJK 2018 en Hispanio. La evento okazis en Badajoz, hispana urbo ĉe la landlimo kun Portugalio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto... [...]

Listo de respondecoj de la Estraro 2018-2019 de TEJO

Kiu respondecas pri kio en la nova Estraro 2018-2019 de TEJO? Jen kompleta listo de respondecoj kaj kontaktdetaloj de ĉiu estrarano: Hoan Tran – Ĝojo (Vjetnamio) – Prezidanto; prezidanto@tejo.org, hoan.tran@tejo.org Komisionoj: Merkatiko & Informado (Informado), Landa Agado – Ameriko Respondecoj: Rilatoj... [...]

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Dankon por la freŝa numero de Turka Stelo.
Petro Palyvoda, el Ukrainio



Dankon por la ĉiam interesa revuo kaj la publikigo de la Klara Ilutoviĉ - poemeto. Mi printis la paĝon kaj sendos ĝin al ŝi.

Lenke Szász, el Rumanio



Elkoran dankon. Monato havas jam grandan konkuranton ĉe via revuo...

Bardhyl Selimi, el Albanio



Mi kore dankas kaj gratulas pro la nova numero de Turka Stelo.

Bela laboro!

Paulo Sergio Viana, el Brazilo



Kara amiko, mi ankoraŭ ne finlegis la septembran numeron de "Turka Stelo" kaj mi deziris skribi al vi, ke la septembra numero tre plaĉas al mi. Ĝi estas tre riĉenhava. Mi ne diras tion, ĉar vi aperigis mian eseon, sed ĉar "Turka Stelo" riĉigas miajn konojn. La temoj de la artikoloj estas diversaj, la kunlaborantoj estas el diversaj landoj kaj laŭ mi "Turka Stelo" estas retrevuo, kiu laŭ la enhavo samnivelas al aliaj nacilingvaj retrevuoj, sed ĝia avantaĝo estas, ke ĝi aperas en Esperanto kaj legeblas en diversaj landoj de la mondo. Mi tutkore deziras al vi novajn sukcesojn.

Georgi Miĥalkov, el Bulgario

La unua UK en Portugalio

-- el La Balta Ondo

103a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, la 28an de julio – la 4an de aŭgusto 2018

Antaŭ la kongreso multaj eŭropanoj eble timis la Sud-Eŭropan varmegon, tamen la unuaj tagoj de la kongreso estis en Lisbono pli malvarmaj ol en multaj Eŭropaj landoj, inkluzive de norda Eŭropo. Tamen la ekskursita tago kaj la finaj tagoj de la kongreso ofertis kutiman sudan varmegon de pli ol 40 gradoj. La kongresejo estis eble milde klimatizita, tamen eble ne, ĉar la pordoj de kelkaj salonoj estis malfermitaj eksteren dum la programeroj. La flughaveno de Lisbono situas konvene proksime de la urbocentro, sed la alia flanko de tiu konveneco aŭdeblis kongreseje, ĉar la aviadiloj flugis alteriĝe ĝuste super ĝi, ofte je nur kelkminuta intervalo.

urbocentra teatro sufiĉe malproksime de la kongresejo. Fadu, la portugala kantostilo, kaj la tradiciaj dancoj estis la ĉefa parto de la nacia vespero. Eble iom limigita rigardo al la portugala kulturo, tamen sufiĉe spektakleca.

La malmultekostaj pladoj de universitata manĝejo estis ofertitaj ankaŭ al kongresanoj kaj la tuta manĝo kun deserto ktp kostis nur 2,5 eŭroj, sed la rezulto estis ankaŭ longaj vicoj dum la lunĉotempo. Mi emis stari en tiu vico nur dufoje dum la semajno. Tamen la vico por malgrandaj manĝetoj kaj trinkaĵoj estis feliĉe malpli longa, kaj eta biero kostis nur 80 cendojn. Eblis sidi ankaŭ ekstere, kie troveblis ombraj lokoj ĉar la rekta suno estis simple troa.



(foto de *anna Striganova*)

La kongresejo estis universitato, kiu parte konvenis, parte ne. La salonoj estis konvenaj por prelegoj, kaj la festosalonoj por artaj programeroj, nur la movada foiro estis lokita en tro ŝtopita koridoro. Tamen la inaŭguro kaj nacia vespero okazis en

La Komitato de UEA havis eksterordinare multajn kaj longajn kunsidojn, kvankam ili ne ĉiam komenciĝis je la anoncita tempo, ĉar la gardistoj de la rektorejo, kie okazis la komitataj kunsidoj, ne permesis eniri la konstruaĵon. Nova ordono al ili venis nur 10 minutojn post la anoncita komenco kaj la kunsido povis komenciĝi je 20 minuta malfruo. La Komitato elektis unu novan komitatanon C, kiu farigis Rakoen Maertens, kaj novan estraranon Fernando Maia. Al estrara posteno sopiris eĉ ses kandidatoj (el kiuj unu, Michaela Lipari, forfalis ĉar ŝi ne elektiĝis al la Komitato) kaj necesis du voĉdonadoj, ĉar en la unua neniu ricevis pli ol duonon da voĉoj.

Krome, tute sen diskuto okazis nuligo de la Jarlibro de UEA, almenaŭ por la venonta jaro, ĉar en la akceptita buĝeto ne estas mono por eldoni ĝin. La

longe atendata nova retejo espereble solvos ĉion, almenaŭ tiun impreson eblis ricevi per aŭskultado de gravulaj paroloj pri ĝi. Nur malmultajn saĝajn parolojn eblis aŭdi pri tio, ke eble la retejo kaj nuligo de paperaj eldonaĵoj ne solvas ĉion. Se iam antaŭ deko da jaroj aŭ pli, kritikoj kontraŭ la Centra Oficejo kaj Estraro estis pli akraj, nun forta kritiko tute mankas. Ĉu ne plu videblas alternativa politiko por finance malekvilibra UEA? Apud la nova retejo alia savoringo ŝajnas esti la volontuloj aŭ robotoj, kiuj laŭ kelkaj komentoj povus solvi la problemojn. La planita deficitito en la buĝeto de UEA estos granda ankaŭ venontjare, sed la Komitato eĉ pligrandigis ĝin per malaltigo de kotizoj kaj per pligrandigo de diferenco de kotizoj laŭ vivnivelo de landoj. Espereble la loĝantoj en malriĉaj landoj nun amase aliĝos al UEA por porti almenaŭ iom da enspezoj, kaj espereble la kostoj pro membroj, kiuj pagas nur du-eŭran jarkotizon ne estos pli altaj ol tiu kotizo. Se okazos alie, mi kredas ke la venonta jaro portos novajn ŝanĝojn al la kotiz-sistemo kaj fortan kritikon kontraŭ la ekziĝonta Estraro. Ĉi-foje ankaŭ ne okazis divido al diversaj grupoj por demandi al unuopaj estraranoj, kio iom bremsis la diskutojn inter estraranoj kaj publiko en pasintjara kongreso.

Mi ekskursis al la urbo Evora en orienta Portugalio, kie eblis vidi, interalie, preĝejon faritan el homaj ostoj. La ideo por la uzo de tiu konstrumaterialo (estis ankaŭ betono aŭ alia materialo por subteni la strukturon) estis franciskana protesto kontraŭ troa uzo de oro en kutimaj preĝejoj kaj memorigo pri la morteco de la homo.

Alia ekskurso portis min al la urbocentro por aŭskulti Koimbran fadon. Apudsidanto ŝokiĝis, kiam evidentiĝis, ke inter la kantistoj estas ankaŭ la prezidanto de LKK (kiu bone kantis) kaj alia LKK-ano (kiu preskaŭ perdis sian voĉon). Nu, por mi la atmosfero estis hejmecca kaj amikeca, sed samtempe

okazis ankaŭ internacia arta vespero (de kie mi ĵus volis per tiu ekskurso eskapi al io loka kaj pli profesia), kaj tiel pensis ankaŭ mia apudulo.

La kultura programo abundis, ankaŭ la kutimaj prelegoj pri la kongresa lando, kvankam unu el tiuj prelegoj ne okazis, ĉar la preleganto simple forgesis pri ĝi aŭ estis okupita aliloke. Vere malmultis portugaliaj organizantoj, tamen tio ne aparte rimarkeblis. La scienca programo havis ĉi-foje ankaŭ sciencajn kafejojn, kiu enhavis pli mallongajn prelegojn pri sciencaj temoj kaj tiel eblis havi pli da prelegoj en sama tempo.

La kongresa kuriero aperis dum kelkaj tagoj nur en dupaĝa formato anstataŭ la kutima kvar-paĝa, evidente mankis materialo, eĉ se la fotoj estis nekutime grandaj, kaj la redakcio ne sukcesis inventi ion por plenigi la paĝojn. Inter la kurieraj inventitaj aferoj tamen estis la malĝusta dato por la luneklipso en la unua numero (kaj korekto pri tio en dua numero), pro kio tute senkulpe estis persekutita ankaŭ nia astronomo Amri Wandel. Tamen unu novaĵo de la kongresa gazeto estis, ke preskaŭ ĉiunumere aperis rekomendo pri iu inda libro en libroservo. Laŭdire la libroservaj vendoj estis iomete pli bonaj ol en la pasintaj jaroj.

Mi finis la kongreson per Nitobe-simpozio, kiu estis interesa, sed mi perdis la duan tagon pro revenflugo, kiun mi mendis antaŭ ol mi informiĝis pri simpozio.

Tiu ĉi estas la lasta kongresa raporto kiun mi verkas por La Ondo. Venontjare mi mem okupiĝos pri kongresaj aranĝoj kaj tiel perdos mian neŭtralecon, kaj krome mi timas ke miaj raportoj komencas tro ripeti sin mem.

verkis **Jukka Pietiläinen**, el Finnlando

Fonto: La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2018/08/uk-15>

Lisbono



Ĉi tiu urbo serenas - Lisbono ridas kaj ploras - kaj resopiro alvenas eĉ antaŭ ol oni foras...

Deziro - sur grunda ŝtono. Songo - falanta folio. Pli ol videblas, Lisbono, pli ol gitarnostalgio...

verkis **D-ro Paulo Sergio Vianna** el Brazilo

Fonto: <https://blogdopaulosergiovianna.blogspot.com/2018/08/lisboa.html>

La Vesperto

Post jarcentoj la vesperto revenas Koimbron. Tuj kiam ĝi eniras en la universitaton, stranga sento ekprenis ĝian koron. Neatendite la okuloj malĝoje eklarmis. Ĉu la amata biblioteko rememorus ĝin?

Kredu min, leganto aminda, eĉ fantomaj vespertoj spertas amsuferojn!

verkis **Maria Nazaré Laroca** el Brazilio

Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com/2018/08/o-morcego-la-vesperto.html>



Ŝajnas al mi, ke ĉiuj bone scias, kiom agrabla, kiom plaĉa kaj dolĉa estas la senso vekata de ajna nia venko, de ajna nia sukceso. Tiu koncepto, tamen, naskas multajn demandojn rilate al la homa emo al la venko. Kompreneble, ĉiuj deziras la venkon, mi scias neniun personon, kiu preferas malvenkon; tamen, iu antikva mia amiko demandas min: “ĉu, do, vi estus vere feliĉa se vi ĉiam je ĉio venkus?”, kaj: “kian meriton havus por vi la venko, se vi neniam estus gustuminta la malvenkon?”. Ŝaĝaj paroloj, kiuj montras, ke en nia vivo estas kaj devas esti, venkoj kaj malvenkoj, sukcesoj kaj malsukcesoj. Kaj tio ĉi memorigas al mi la historion kiun mi ĉisube rakontos, pri glora venko kaj pri ordinara malvenko, historio kiu krome provas, ke ankaŭ la dioj devas iam gustumi la maldolĉon de la malvenko, ĉar ankaŭ tiuj devas esti pli modestaj.



Estis Apolono (Απόλλων), tiu subluma dio, la plej brila el ĉiuj aliaj, ĉefe ĉar li estis la dio de la lumo, sekve, ĉar li estis la protektanto de la poezio, de la muziko kaj la

ceteraj artoj. Li, kompreneble, estis fiera, ĉar li bone sciis, ke li estas objekto de senlima admiro de dioj kaj homoj.

Lia plej ŝatata restejo estis lia naskiĝloko, la belega insulo Deloso (Δήλος), sur kiu estis lia brila, majesta sanktejo, la alloga celo por sennombraj helenaj kaj barbaraj pilgrimantoj. Tamen, la dio kutimis traŭradi la tutan mirindan Helenujon (Ελλάς) kaj el inter la sennombraj belaj lokoj li preferis la nekompereblan belecon de la monto Parnaso (Παρνασσός). Tie, en vasta valo akvumita de kristalaj fontoj, en loko por eterne sanktigita de la fortiritaj en la plej fora paseo praaĵoj, tie, kie la suno ĉiam plej karese brilas, kie la luno almalsupras ĉiunokte por akompani pace la diajn kaj homajn sonĝojn, por kvietigi ĉian fortan pasion, tie, en la mirinda loko nomata Delfoj (Δελφοί), la granda dio decidis fondi sian plej grandan sanktejon, la eternan religian kaj civilizacian centron de la tuta helena mondo.

Tamen, tio estis ne facila afero ankaŭ por dio, ĉar, por atingi la elektitan lokon, oni devis trapasi regionon treege danĝeran. Tie, en la profundaj, mallumaj

kavernoj kaj grotoj de la montaj krutaĵoj, vivis la terura Pitono (Πύθων), la forgesita praa gardisto de la tre antikva tiu sankta loko.



Pitono estis monstra grandega serpento, ia terura, multkapa drako, kun superdiaj fortoj, kiu povis skui la tutan monton, kiu povis engluti tutan gregon da bovinoj, kiu povis ĉion detrui per nur unu sia blovo. Lia korpo, tute kovrita de grandaj, malmolaj skvamoj, serpentglitadis inter la kavoj, la fendegoj kaj kavernoj de la krutaĵo, formante sennombrajn volviĝojn. El ĝiaj multaj, fajraj okuloj elŝprucadis subitaj altaj flamoj, tiel, neniu viva estaĵo povis alproksimiĝi al la regiono gardata de la terura serpento.

Tamen, Apolono portis ne nur liron, sed ankaŭ sian arĝentan akron kaj la nemalplenigeblan sagujon kun la oraj sagoj. Li flegadis la muzikon kaj la artojn, tamen, samtempe li persekutadis, forpelis kaj ekstermis ĉian malbonfaran naskitaĵon de la mallumo, kiu minacis, teruris aŭ malutilis la homojn.

La brila dio ne timis, do, li flugis rekte al la kaŝejo de la monstro, kiu, tuj flarsentinte la fremdan apudeston, eligis teruran roron kiu ekstremigis la tutan monton. Apolono pli multe alproksimiĝis kaj tiam, el diversaj direktoj de la profunda kaverno elfjetiĝis grandegaj skvamkovritaj polpobrakoj, kiuj per fulmaj movoj trabatadis la aeron serĉante la aŭdacan invadinton. La dio, same rapide moviĝante, evitadis la batojn kaj per sovaĝaj krioj provokadis la monstron. Tuj poste, la monto skuiĝis kaj el la abismo eke elrektiĝis la horora, grandega, multkapa serpento, kiu per sia alto kovris la sunan lumon. La abomena monstro eligis unu ankoraŭ teruran kolerblekegon kaj komencis elfjetadi ĉirkaŭen fluidecajn, kvazaŭ lafajn flamojn, kiujn la dio, rapidege moviĝante zigzage, kvazaŭ en freneza danco, sukcese evitadis. La monstro, pli kaj pli furioze batadis maltrafe ĉirkaŭen, sed, dume, la oraj sagoj de la dia arko komencis torente fali sur ĝin. La unuaj sagoj konsternis kaj incitis la monstron, kiu freneze furiozis skuante la krutaĵon, disjetante grandegajn rokojn, flamojn, venenajn salivojn. Sennombraj sagoj trapenetradis la tutan korpon de la monstra serpento, kiu, post ankoraŭa vana batalado, komencis spasme finbaraktadi, tordiĝante pli kaj pli senforte, ĝis kiam ĝi falis mortinta en la abismon!

En nur unu momento, la plej brila suno ekverŝis oran lumon sur la monto, sur la dibenita valo. Eĉ la plej krutaj deklivoj de la monto subite verdiĝis, ĉie



ekkreskis diverston kaj verdaĵoj, la tuta loko pleniĝis je koloroj kaj belaj odoroj. Svarmoj da alflugantaj buntaj birdoj plenigis la lokon per mirinda kantado; grandaj kaj malgrandaj bestoj, ĉiaspecaj insektoj, rampaĵoj, ĉiaj vivaj estaĵoj alvenis al la sankta, ankoraŭfoje

sanktigita, loko. Jes, la elliberigita valo de Delfoj estis la plej bela loko de la tuta mondo, preta akcepti la plej brilan sanktejon-divenejon, tiun de la sublimes, plej splenda dio.

Apolono lasis la arkon, li prenis sian liron kaj, tute kontenta kaj feliĉa, komencis kanti sian amatan peanon. Estis ĝenerala festo, kiun partoprenis ĉiuj kiuj hazarde pasis de la mirinda loko.

Pasanto, kiu haltis kaj kun miro rigardadis ĉirkaŭen, estis la juna Eroso (Ερως), la dio de la amo. Apolono, en tia bonega humoro, ekvidis la junan dion, kiun multe simpatiis kaj, por ŝerce moketi lin, diris: “ĉu vi, etulo, aŭdacas stari antaŭ mi tenante arkon? ĉu vi ne scias kia arkisto mi estas?”. Eroso, per same ŝerca sinteno respondis: “vi, ja, estas la plej bona arkisto laŭ tio, ke vi ĉiam trafas vian celon, tamen, ankaŭ miaj nevideblaj sagoj neniam maltrafas, kaj se vi povas kaŭzi doloron kaj morton, mi povas estigi plezuron, feliĉon kaj vundojn dolĉajn; tiel, mi superas vian arton”. Apolono komencis ridi kaj tiam Eroso levis sian arkon, li celis kaj sendis sian nevideblan sagon rekte al la koro de la brila dio.

Eroso, kiu sciis ĉion rilate al la amdeziroj kaj pasioj de ĉiuj dioj kaj homoj, sciis bone, ke en Parnaso



tiradis Apolonon ne nur la deziro pri lia sanktejo, sed ankaŭ pri Dafna. Kaj Dafna estis tre juna, belega nimfo, filino de la granda diino Tera (aŭ Gaja) (Γη), kiu plejofte trairadis la mirindan valon, sin banis en la kristalaj akvoj de la delfaj fontoj, ŝi ornamis sin per la plej belaj floroj, flegadis la plej ĉarmajn bestetojn kaj kantadis, belege akompanante la sennombrajn birdojn, kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi.

Eroso, sciante ke Apolono kaŝe observadis la belegan junulinon kiun li admiris, trafis lin neatendite. La dio agrable konsterniĝis kaj tuj sentis, ke lia admiro por la belega nimfo ŝanĝiĝis al senbrida amorpasio. La bela dio, kiu ne kutimis uzi perforton aŭ artifikojn por gajni la amon por akiri deziratan virinon, prezentiĝis, en sia plena brilo, antaŭ la virga puberulino, dezirante paroli al ŝi. Tamen, la junulino, mirigite de la subita dia brilo, sentis senliman teruron kaj komencis forkuri, ekkriante lamente. Apolono, same surprizite pro la neatendita reago, provis sekvi la virgulinon kurante post ŝi. Tera, aŭskultinte la timokriegojn de sia filino, hastis helpi ŝin, ŝi, do, disfendiĝis kaj englutis Dafnan.

Kiam Apolono atingis la punkton en kiu Dafna malaperis, li trovis ĵus kreskintan, belegan, aroman arbon, al kiu li donis la nomon de la aliformiĝinta, perdita virgulino, li nomis ĝin dafno (laŭro). Poste, li deŝiris branĉeton de la bonodora arbo, li plektis el ĝi kronon, kiun li metis sur sian kapon. Apolono benis la arbon, ke ĝi estu ĉiam verda, freŝa, daŭrfovia, amata kaj utila al la dioj kaj la homoj en la tuta mondo. Poste, ege ĉagrenite pro la perdo de sia amatino, pro la nekontentigita sia amoro, ekiris kun moderigita entuziasmo al sia amata sanktejo.

Tie, atendis lin la juna Eroso, kiu, kun moka mieno, silente rigardis la malĝojan grandan dion kaj nur pike montris al li sian arkon. Apolono, diris nenion, klinis la kapon, preterpasis.

Jes! kiel mi jam diris, ĉiu povas kaj devas iam venkiĝi.

Mi diru ankoraŭ, ke ekde tiam, ne nur Apolono, sed ĉiuj poetoj kaj aktoroj portis la dafnan kronon. Kaj, honore al Dafna kaj Apolono, la dafna krono iĝis simbolo de venko. Portis ĝin la herooj de milito, la venkintoj de atletaj kaj artaj konkursoj, ĉiuj homoj kiuj meritis la komunan admiron, estimon kaj respekton.

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Tiu diabla mardo havis malluman kaj timegan nokton. Ne pensu ke mi, dumnokte, vidis vampiron aŭ nudan sorĉistinon! Ne. Tiun tagon mi havis la dekkvaran datrevenon de mia naskiĝo, dum vespere, unuafoje, mi spektis basketbalan matĉon kaj unuafoje mi fariĝis ies fano.

La unua homo, bonaŭgurinta mian naskiĝtagon, estis Jelena, la malgranda filino de Zoran, eksa nia najbaro, kiun, ekde la fino de la milito mi ne plu vidis. Ŝi estis la unua virino kiu plaĉis al mi kaj, la veron dirante, ofte mi masturbiĝis rememorante ŝiajn femurojn.

Mi memoras tiel bone, kvazaŭ tio okazus hodiaŭ, tiun posttagmezon, kiam ŝi alproksimiĝis min kaj bondeziris "maljuniĝon", akompanante la aŭguron per ĉirkaŭbrako kaj kisado sur la maldekstra vango, kio ĝojigis min, sed ne la onklon Rustë, la pliaĝan fraton de la mia patro, kiu estis vidanta nin de la alia flanko de la strato. Mi apenaŭ estis rimarkinta lin, ĉar, se mi rimarkus lin, mi ne lasus Jelena-n ĉirkaŭbraki min, eble mi eĉ forpuŝus ŝin, sed, jen, mi ne estis tiel "bonŝanca" vidi lin kaj, sekve, mi sentis la lipojn de la virino tuŝante unuafoje mian haŭton.

"Knabo...knabo...", - alparolis li min. "Ĉu vi ne fariĝis viro, do?".

Mi ekridetis pensante ke li bonaŭgurus mian naskiĝtagon kaj donus iun donacon, kiel tion li kutime faris, sed li frapis min per manplato, kiun mi neniam forgesos ĝis mi vivos.

"Ĉu vi volas fiki la ŝkinan¹ piĉon, do..?,- alkriis min la onklo, tiel forte, kiel tion aŭdis ankaŭ lia pliaĝa filo, Afrim.

"Haltu patro ĉar vi ja stultigis la knabon...!", - aldiris Afrim kaj altiris min al si.

"Euu...Dio mortigu ĉi tiun! Interkisiĝas li kun la filino de Zoran, poliestro. Ĉu li scias ke, se Zoran vidus tion, certe fikus nin ĉiujn, pereigus homojn kaj bestojn niajn! Forigu ĉi tiun diableton de ĉi tie, se vi ne volas ke mi denove alfrapu lin ĝismorte".

Afrim, la plej aĝa inter la onklaj filoj kaj posedanta sian aferismon, deponejon de kie li vendadis konstrumaterialojn, kio tiam nomiĝis "pllac", brakprenis min kaj venigis min en la hejmo, sed ne bondeziris mian naskiĝtagon. Kelkfoje mi provis sciigi aŭ ne sciigi lin pri la fakto ke hodiaŭ mi fariĝis dekkvar

jara. Unuflanke, min plaĉis sciigi tion al li, ĉar mi volis ke li aĉetu por mi donacaĵon, aliflanke mi hezitis, ĉar nun mi estis iom pli kreskita kaj ne plu volis ke la aliaj konsideru min ankoraŭ infanon. Tion mi jam konsideris principon, t.e. ekde nun mi devus konduti kiel la plenkreskuloj. Tamen, pro la deziroj, mi rompis la principon kaj decidis sciigi al li pri la naskiĝtago mia. Li, ne ĉar ne ĝojiĝis, kvankam ne bondeziris min je ĝusta senco de la vorto, promesis min ke li venigus min en "lokon", je ne ordinara nomo, pri kiu mi neniam antaŭe estis aŭdinta. Sed mi, obeema kiel ĉiamfoje, nur kapjesis por la "donacaĵo". Ankoraŭ hodiaŭ mi ne scias ĉu tiu loko estis nokta klubo aŭ simple ordinara kafejo.

Ekstere estis jam mallume kaj la horo estis pli malfrue ol la vespera ok, dum mi estis preta por iri al la "loko" promesita de Afrim, kiu estis reveninta de sia deponejo kaj troviĝis en la ĉambro kune kun mia patro kaj onklo Rustë. Ĵus mi estis eniranta, mi aŭdis ke ili estis babilante maltrankvile pri la reganta situacio, tial "mi decidis" pluresti kaj aŭskulti ĉe la pordo.

- "Ĉu vi pensas ke ĉi fihundoj malĝojiĝas?!"- estis dirante la onklo al Afrim. "La kverelo pro pilko, ĉu ne? Ne pensu tiel!", - aldonis mia patro.

- "Tiel diris min ĉi tiu Ivica, kiu iam estis saobraĉaj². Li diris ke Jugoslavio ne venkos ĉivespere en basketbalo, kaj ĉi tiuj antaŭmilitistoj de Arkan³ drinkegas kaj povas pafadi kaj perforte eniri en la domojn, samkiel tion ili faras en la kamparo".

- "Ne, do! Kiel povas okazi do tio! Mi ne scias kion diri!", - neis dubeme mia patro.

- "Venu kaj ni kunprenu niajn familianojn kaj alilokigu ilin, antaŭ ol trafu nin malfeliĉego", - ektimis la pliaĝa frato de la mia patro.

- "Ne hastu Rustë, ĉar, lastlaste, neniu freneziĝos pro la sportludo. Aldone, ili ne povas eniri en niajn hejmojn, ĉar ne ekzistas kialo por tio. Ĉi tie, en la urbo, ne estas UÇK⁴ kaj ĉi tiuj fihundoj nur la vilaĝojn atakas, ĉar tie estas UÇK-anoj", - parolis malvarme la malpliaĝa ties frato, kio impresigis ke li trovis solvon per sia optimisma "analizo", kion li faris ne rarfoje. Post ĉi tiuj interŝanĝitaj vortoj, ankaŭ mi ektimis, forgesante, dum iom da tempo, la promesitan "donacon" de Afrim kaj forkuris por spekti la matĉon. Ne ĉar plaĉis min tiu ludo, eĉ mi povas diri konvinkite ke tiu basketbala matĉo estis la unua ludo de mi spektita en mia vivo. Sed, ĝin mi ne povis spekti en mia hejmo, ĉar nur en la sidĉambro ni havis



televidilon, tial mi iris al Gazi, mia amiko, filo de Hajdin, nia najbaro, kaj ni lanĉis la duan kanalon de RTS⁵.

La ludo estis komencinta kelkajn minutojn pli frue. Ludis Jugoslavio kontraŭ Lituanion. Post kiam mi sciigis al Gazi la kialon de mia vizito, ambaŭ ni fariĝis ardaĵoj de la blukoloruloj kaj malamantoj de la lituanaj verduloj, ĉar nur en tiu ĉambro ni havis malamantojn de la lituanaj verduloj, estantaj konvinkitaj ke tiel ni savus nian kvartalon.

Lituanio, pri kiu antaŭe mi havis neniun ideon ĉu ekzistis aŭ ne, tiun nokton fariĝis inkuba sonĝo por ni kaj, ĝis la fino, ne transirebla ŝtormo por niaj "adorituloj".

Tiom multe mi malamis la lituanajn pilkofrapojn, aparte la triopojn, kiom mia koro tremiĝis kiamfoje ili superis nin. La nomoj de iliaj ĉefaj ludantoj, Sabonis kaj Marĉelionis, ŝajnis al mi tiutempe kvazaŭ diablaj nomoj. Ĉi tiu malkvieteco kaj tensio en mia menso daŭris ĝis la fino de la matĉo, kiam Jugoslavio eksuperis kaj venkis ĝin. Kaj mi, ankoraŭ ne intersalutante kun Gazi, forkuris al mia hejmo por sciigi la miajn ke la danĝero jam pasis.

Preterpasante la strateton kiu dividis niajn hejmojn, mi aŭdis tremigajn pafojn de la serbaj aŭtomatiko, kiujn mi ne estis aŭdinta antaŭe en nia kvartalo, ankaŭ en nia urbeto.

Malferminte la hejman pordon, mi vidis la koridoron malplena, kaj pensante ke miaj familianoj timis ĉar ili ankoraŭ ne sciis la rezultaton de la matĉo, mi kriis: "Farite! Farite! Jugoslavio venkis! Jugoslavio venkis!"

Mi estis konvinkita ke mi alportis hejme ĝojigan heroldaĵon, ĝis kiam mi eniris en la salonon kaj ekvidis plorante la patrino kaj la du filinojn de la onklo. Tie mi eksciis ke la serba polico estis enkatenginta mian patron kaj kunpreninta lin. Tiun momenteton mi eksentis animan debuliĝon, nepriskribeblan per vortoj,

Ŝi skuis la kapon.

"Hieraŭ ankaŭ mian pranevon, la filon de mia nevino de Suĥarevo, oni prenis por tiu malbenita milito. Ne estas alia viro en la familio ĉar la pli aĝa estis mortigita dum la pasinta Pentekosto. Restas la virino kun filineto, kiu estas samaĝa kiel Andreo... nu, kiel kultivi la kampon?... Ĉiuj ricevas sian mizerparton."
"Jes, tio estas trista epoko... Kaj Dio bonvolu..."

Li interrompis ŝin kaj abrupte diris :

"Nu, bonan nokton, Tatjana."

"Bonan nokton, Nikolao Aleksandroviĉ."

internan ploradon, kiun la homo ne povas eligi per voĉo. Mi ne povis plori nek demandi kio okazis kaj kiam revenos mia patro, sed mi nur iris en la ĉambron por ekscii plu de Afrim kaj onklo Rustë, kiuj sidis rompmitiende, neniun vorton dirante, atendante kaj pensante pri tio kio okazus al mia patro kiu, pli malfrue, liberiĝis kaj klopodadis per ĉio konvinki nin ke nenio okazis, krom ordinara infromiga konversacio. Kaj, du tagojn post ĉi tiu "ordinara konversacio", la patro foriris al la montaro, en tiuj profundaj vilaĝoj, kio tute konvinkis min ke lin ne plaĉis la "ordinareco".

Tiun nokton de la nigra mardo mi sentiĝis terure seniluziigita, ĉar la "faneco" rezultigis envana kaj tio igis min senesperigi tiel multe, kiel mi pretpretis krevi pro la kolero. Ŝajnis al mi kvazaŭ mi estis la kulpulo kiu alportis la venkon al jugoslavo kaj la malvenkon al lituanoj. Tiujn momentetojn, mi kompatis pli pri ĉi tiuj lastaj, tiel ke, se ili estus tiam apud mi, mi pardonpetus ilin pro la farita domaĝo. Tamen, iamaniere mi "pentis", kiam, plenigita per galo kaj senbride malĝoja, mi eliris al la korta pordo kaj ovaciis: "Sabonis! Sabonis! Marĉelionis! Marĉelionis! Lituanio! Lituanio...!"

Aklamante, mi rimarkis aŭtilon ĉe la stratangulo, kun ambaŭ antaŭaj longaj lumigiloj ŝaltitaj, kiuj timigis min, kvazaŭ du vampiraj okuloj. Tial, mi forlasis la straton fulmrapide, kvazaŭ kuniklo, post kiam mi aklamis kiel Akilo, kiu tiamaniere notas la finon de la tago, kiam fariĝas dekkvar jara.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

¹ Tiel oni moknomas en Kosovo serbojn

² Stratpolicisto

³ Fifama krimulo serba

⁴ Naciliberiga Armeo de Kosovo

⁵ Radiotelevizio de Serbio

Ŝi atendis dum li trairis la salonon, kaj restis senmova, aŭskultante la pargeton krei sub liaj paŝoj. Ŝi malfermis la etan vazistason aranĝitan en la vitro. Frosta vento fortege blovis, levis ŝian ŝalon kun misordigitaj tufoj da haroj.

La maljuna virino ridetis kaj fermis la okulojn.

Ŝi naskiĝis en kamparo malproksime de la familio Karin, en la nordo de Rusio, kaj ŝi opiniis, ke neniam estas sufiĉe da glacio, sufiĉe da vento.

"Ĉe ni, en la printempo, la glacieron ni rompis per niaj nudaj piedoj, kaj tion mi ankoraŭ volonte farus " ŝi diris.

(daŭrigota)

tradukis **MIKELO (Michel Dereyger)**, el Francio

DUA PARTO - LA VIVO



50

49

La saĝulo ne havas propran koron.
Li faras el la koroj de la homoj sian.
Al la bonuloj mi estas bona,
ankaŭ al la nebonuloj mi estas bona;
ĉar VIVO estas boneco.
Al la fidindaj mi estas fidinda,
ankaŭ al la nefidindaj mi estas fidinda;
ĉar VIVO estas fidindeco.
La saĝulo vivas en la mondo tute kvieta
kaj vastigas sian koron por la mondo.
Ĉiuj homoj rigardas al li kaj aŭskultas lin.
Kaj la saĝulo akceptas ilin ĉiujn kiel siajn
infanojn.

Komento de Anniespera

Vilhelmo: "ĉar VIVO estas boneco."

La vivo mem ne estas boneco, sed oni povas atingi ĝin laŭ Laocio.

Vilhelmo: "Al la fidindaj mi estas fidinda, ankaŭ al la nefidindaj mi estas fidinda;"

En la originala teksto Laocio fidas kaj al fidindaj kaj al nefidindaj. ĉar VIVO estas boneco. Vivo mem ne estas fidindeco, sed oni povas atingi ĝin laŭ Laocio.

Vilhelmo: "La saĝulo vivas en la mondo tute kvieta"

La frazo ne estas en la originalo.

Rimarko de Cezar

Kiom ofte oni ridis jam pri la diro de Jesuo, ke oni post ricevo de bato sur vango prezentu ankaŭ la alian por ricevi pluan baton. La ridantoj pensas, ke tio estas tute stulta ago. Sed jam Laocio rekomendis, ke oni respondu malbonecon per boneco. Bonulo laŭ Laocio havas pli da reputacio ĉe la homoj ol perfortulo. Mi pensas, ke tio certe estas bona strategio, almenaŭ pli bona ol tiu, kiu baziĝas nur sur venĝo, aŭ eĉ pli terure sur „militaj rebatoj“. Sirio, en kiu devis morti pli ol mil da homoj en venena gaso kaj poste ambaŭ partioj asertis, ke ili ne kulpas pri tio, estas aktuala kruela ekzemplo por tio, kiom la mita Jesuo kaj Laocio pravas! Per perforto paco neniam kreblos, nur senfina spiralo de perforto tiel ekestas. Bonulo estas tiu, kiu ne havas koron por si mem, sed por ĉiuj.

Elirado estas vivo, enirado estas morto.
Kamaradoj de la vivo estas triono el dek homoj.

Kamaradoj de l' morto estas triono el dek homoj.

Homoj, kiuj vivas kaj dum tio moviĝas al la loko de la morto, estas same triono el dek homoj.

Kio estas la kaŭzo pri tio?

Ĉar ili volas plilongigi la vivon.

Mi ja aŭskultis, ke tiu, kiu scias vivi, migrante tra la lando, nek renkontas rinoceron nek tigrojn.

Li paŝas tra armeo kaj ne evitas kirasojn kaj armilojn

La rinocero trovas nenion, en kion ĝi povus bori per sia korno.

La tigo trovas nenion, en kion ĝi povus bati per siaj ungegoj.

La armilo trovas nenion, kio povus percepti la akridon.

Sed kial?

Ĉar tia homo ne havas morteblan lokon.

Rimarko de Cezar

La pacifisma malmilitemo de Laocio en tiu ĉapitro kvazaŭ saltas el ĉiu linio. La unua imperiestro de Ĉinio, kiu volis vivi eterne, pensis ekzakte male. Tial li fidis al neniu kaj konkeris multajn landojn, kaj tamen li ĉiutage devis timi pri sia vivo, spite al tio, ke multaj gvardianoj de kirasita armeo, unu el la plej grandaj de lia tempo, tage kaj nokte protektis lin.

Homo, kiuj ne havis morteblan lokon krom unu, troviĝas en la germana Nibelungen-legendo. La heroo Siegfried (Venkopaco) estis ne mortigebla, ĉar li banis en drakosango, nur je tiu loko, kie li surhavis dum la banado tilian folion, li estis mortigebla. Lia murdisto Hagen de Tronje pikis de malantaŭe per lanco en tiun vundeblan lokon, kiam Hagen trinkis freŝan akvon en roĝo. Ankaŭ la greka militfurioza heroo Aĥilo estis preskaŭ tute nemortigebla, ĉar li banis en la submonda rivero Stikso. Sed ankaŭ li havis tian vundeblan lokon, la kalkanumon, kaj fine li devis morti. Ĉar Homero vivis proksimume 850 jarojn antaŭ Kristo, povas esti ke Homero influis nerekte komercvoje Laocion. Mi bone povas imagi, ke la greka mitologio en la antikva Ĉinio ne estis tute nekonata, ĉar ĝi disvastiĝis sur malnovaj komercvojoj ĝis tien.

(daŭrigota)

Karaj geamikoj, karaj legantoj,
Kun plezuro, mi prezentas al vi mian novan
tradukaĵon. Temas pri novelo, eĉ mallonga
romano, de Irène NEMIROVSKY (1903-1942).



Image Irène naskiĝis en Ukraino (tiam Rusia Imperio) en juda familio, kiu parolis la francan. Kiam komencis la Rusia Revolucio, ŝi migris kun sia familio al Francio, kie ŝi iĝis fama verkistino. Arestita de francaj ĝendarmoj kaj deportita, ŝi estis mortigita de la nazioj en Aŭŝvico (Auschwitz).

Forgesita post la Dua Mondmilito, ŝi estas la sola verkisto, kiu ricevis la Premion Renaudot postmorte pro ŝia longa romano "Suite française" (2004).

Ŝian novelon "La Balo" mi jam tradukis en Esperanto.

(Ligiloj :

<https://www.ipernity.com/blog/mike59/685797>

kaj ankaŭ ĉi tie:

<https://novajhoj.weebly.com/libroj-en-esperanto.html>

aŭ ĉe Facebook:

<https://www.facebook.com/groups/librejo/files>)

Mi deziras al vi agrablan legadon!

Koran dankon al IVAR kaj GINETTE pro la atenta legado kaj iliaj amikaj rimarkoj !
Dankon al TJERI pro liaj klarigoj.

MIKELO (Michel Dereyger)

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Ŝi skuis la kapon kun malkontenta mieno kaj silentis.

Nikolao Aleksandroviĉ rigardis la liton de Andreo.

"Ĉu li dormas ?"

"Jes. Ĉu vi volas vidi lin ?"

Ŝi stariĝis, prenis la kandelon kaj proksimiĝis al Nikolao Aleksandroviĉ.


Li ne moviĝis... Ŝi kliniĝis kaj rapide metis sian manon sur lian ŝultron.

"Nikolao Aleksandroviĉ... Kolinka..."

"Lasu min..." li murmuris.

Ŝi silente deturnis sin. Estis preferinde nenion diri...

Kaj antaŭ kiu li povus libere lasi flui siajn larmojn, se ne antaŭ ŝi mem ?...
Ĉu ankaŭ Helena Vasiljevna ... ?
Sed estis preferinde silenti...



Ŝi malrapide retroiris en la ombron kaj duonvoĉe diris :

"Atendu min... mi tuj preparos iom da teo ; ĝi varmigis nin ambaŭ..."

Kiam ŝi revenis, li ŝajne kvietiĝis. Li maŝine turnis la manilon de l' forno, de kiu elfluis gipso kun mallaŭta brueto de sablo.

"Rigardu, Tatjana, kiom da fojoj mi diris al vi, ke oni ŝtopu tiujn truojn... Rigardu, rigardu" li diris montrante blaton, kiu kuris sur la pargeto. "Ili eliras el tie. Ĉu vi opinias, ke tio estas sanfavora por infana dormoĉambro ?"

"Vi ja scias, ke tio signifas prosperon en la domo !" diris Tatjana Ivanovna kun ŝultrolevo. "Danke al Dio, ĉiam troviĝis iuj ĉi tie, kie vi estis edukitaj kaj aliaj antaŭ vi."

En liajn manojn ŝi metis la glason da teo, kiun ŝi alportis, kaj ekmovis la kuleron.

"Trinku dum ĝi estas varma. Ĉu estas sufiĉe da sukero ?"

Li ne respondis, iomete glutis kun laca kaj foresta mieno, kaj subite stariĝis.

"Nu, bonan nokton ! Kaj riparigu la fornon, ĉu vi aŭdis ?"

"Laŭ via volo."

"Lumigu al mi !"

Ŝi prenis la kandelon, iris kun li ĝis la pordo.

La unua, ŝi malsupreniris la tri ŝtupojn de la sojlo, kies malbone fiksitaj ruĝaj brikoj moviĝis kaj kliniĝis sur unu flankon, kvazaŭ kuntrenataj al la tero de pezaĵo.

"Estu singarda !... Ĉu vi jam enlitiĝos ?"

"Ĉu dormi ?... Mi estas trista, Tatjana, mia animo estas trista..."

"Dio ilin protektos, Nikolao Aleksandroviĉ. Oni mortas en sia lito kaj Dio protektas la kristanon meze de la kugloj..."

"Mi scias... mi scias..."

"Necesas Dion fidi."

"Mi scias" li rediris. "Sed temas ne nur pri tio..."

"Pri kio do, barin ?"

"Ĉio iras malglate, Tatjana. Vi ne povas kompreni..." >> 9

Al Vi

Kelkajn mi konas de nekredible longe. Kelkajn aliajn de iom malpli kaj kelkajn el vi mi ĵus nun ekmalkovras. Cetere dankon al tiuj kiuj amikiĝis kun mi en facebook-o.

Mia patro instruis Esperanton al mi kaj mia frato kiel infanoj dum la sepdekaj jaroj. Li estis jam kaj restis ĝis nun ege aktiva movadulo... Tiam, mi ĝuis la sperton, paroli "sekretan" lingvon ene de la familio, partoprenis infankongresetojn kie troviĝis la plej amindaj mirindaj geamikoj kiujn mi eterne ŝategos. Poste kiel junulineto mi ekkomprenis la celon kaj idealon pli bone (sed ĉiam ege amuziĝis dum junularaj eventoj). Kaj ekkonis pli da mirindajn homojn...

Por mi Esperanto estis: fina paco (aŭ nomu ĝin venko), senlima amikeco, foje amo. Landlimoj

skribis en facebook Aline BT, el Francio

malaperis.

Jen la vivo decidis, ke mi devis foriri el tiu amaso da feliĉo.

Jaroj forpasis...

Sed nun, mi deziras revivigi la lingvon kaj idealon en mi kaj pro tio antaŭĝojas legi vin, eble babili foje (mi ne lertas ankoraŭ lasu al mi tempon). Mi kuriozemas pri vi.

Denove, dankon



skribis en facebook **Aline BT**, el Francio


Fonto: <https://www.facebook.com/alinebougortt/posts/10217017064561495>

SOLECO

sendis Lenke Lenke Szász el Rumanio

La 30-an de agosto 2017 forpasis la granda esperanta poetino, Marjorie Boulton. (1924–2017). Omaĝe al ŝi jen poemo de la juna Marjorie Boulton el 1953, aperinta en la unua esperanta poemplibro, "Kontralte" en 1955.

Sendis **Lenke Szász** el Rumanio



Sen seksa juko homo povas sidi;
Ni povas tralabori, aŭ bromidi.

La karno povas vivi tute sola,
Sen ajna tuŝ'tenera aŭ konsola,

En frosta lito sen elektra tremo,
Kaj, plie, sen amika varm' manpremo,

Sen ia ajn kareso karna, homa,
Onklina kis' formala, stacidoma,

Kaj iel, certe, kvankam altakoste,
Ni povas vivi ĉiam karnofroste.

Sed ĉiam ni sopiras al satigo
Alia, per la intelekta ligo,

Trovi, en nia fora alieco,
Ian estaĵon de la sama speco!

Ho sola, stela viv', sen aliancoj,
Vivo de nigra spaco kaj distancoj!

Kial mi tiel pensas pri intimo,
Mi, sola kiel stel' en malproksimo?

Kuraĝajn stelojn povas mi adori...
Ĉar mi neniam aŭdis stelon plori.

16>>

manradikoj amantinaj, kaj manradikoj miaj estos inter viaj kiel la atletaj inter siaj ledobendoj. Miajn brakojn vi kondukos kunajn ĝis trans mia frunto ; kaj ni kunigos ankaŭ niajn fruntojn, kiel por la plenumo ni du de aferoj grandaj sur l'areno, grandaferoj cele al mar', kaj mi mem estos via homamaso en la aren' el inter l'faŭno de viaj dioj.

...

Tiu, kiu en la nokt' superpasas la miakorpan dunon por iri nudkape rigarde pridemandi Marson ruĝantan kaj fortan tian, kia naviglumado sur la maro, mi diras, ke li ne havas de virino uzon nek zorgon...

(la tri eltiraĵoj : en « Maraj gvidpunktoj », parto « STRETAJ ESTAS ŜIPOJ STRETA NIA LITO »)

Funebra odoro de l'rozo ne sieĝos plu kradojn de l'tombo. Vivanta la horo inter palmoj ne mutigos plu sian animon fremdecan. Amaraj, ĉu tiel iam estis niaj vivantulaj lipoj ?

(en « Maraj gvidpunktoj »)

esperantigis kaj sendis **Roland Platteau**, el Francio

Aperis en la libro "**En la lumoj de la ekmiroj**" publikigita ĉe MAS libroj 2018

Ŝercoj



— Amiko, ĉu vi scias, kiam mi ebriiĝas, mi neniam timas.

— Ĉu vi ne timas eĉ vian edzinon?

— Ne, ĝis tiel mi neniam ebriiĝis...

— Peĉjo, vi jam malfruas la lernohoron kvinan fojon ĉi semajne. Ĉu vi scias, kion ĝi signifas?

— Jes sinjorino instruistino. Certe jam estas vendrede.

- Edzino, mi volas sciigi al vi, ke ekde nun ni vivos en multekosta loĝejo. Vi ja volis tion!

- Ho, kara mia, mi estas tre ĝoja! Ĉu ni aĉetas novan

loĝejon?

- Ne, la pago por nia loĝejo plialtiĝas.

Avino agonias

— Vi ĉiam estis bona nepo – diras avino sur la lito mortante – tial mi testamentas por vi mian bienon kun granda domo, bestoj, agrikulturaj maŝinoj kaj 22 milionojn da dolaroj.

La nepo ege surpriziĝas kaj demandas:



— Kie estas tiu bieno?

— Sur fejsbuko.



Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. E/Ŝ (estas ___); 6. ___ kodo estas komputila kodo por la baza latina alfabeto; 7. Konsonantoj de rato; 8. Konsonantoj de rozo; 9. Metala kapŝirmilo por soldatoj; 11. Malmola organo de la vertebruloj (akuzativo).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Danĝera fiŝo por naĝanta homo; 2. E/Ŝ (___ ŝerco); 3. Konsonantoj de roko; 4. Loko por spektakloj de akrobatoj kaj klaŭnoj; 5. Verda loko meze en la dezerto (akuzativo); 10. Konsonantoj de ostoj.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. ___ nio, kiu estas en la ĉielo; 6. Dializa aparato uzas artefaritan ___; 7. Simbolo por erbio je kemio; 8. Simbolo por neodimo je kemio; 9. Detranĉo, tajlo; 11. Sovet___ aŭ USSR (pluralo).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Atentu, ___, ek!; 2. Gaso kiu ĉirkaŭas Teron (akuzativo); 3. Konsonantoj de Ateno; 4. Pli-malpli regula cirklo; 5. La bruantaj ___ de la maro; 10. ___, vi, ili.

Fonto: Semajno de Enigmoj #1

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)

Aziz Nesin en Albanio *

Tio vere okazis. Fama turka verkisto estis tradukita ankaŭ albanlingven. Despli ke li apartenis al maldekstraj literaturistoj kiuj "senmaskigis sovaĝan kapitalismon" en amika Turkio. Temis pri tempo de socialisma epoko en malgranda balkana lando. Ligo de Verkistoj, ĉekape kun Dritero Agolli, decidis inviti s-ron Aziz viziti Albanion je oportuna tempo por li mem. Oni trovis eĉ peranton, unu malnovan lian lernejan amikon, loĝanta en urbo Fier de suda Albanio, eminenta esploristo kaj sciencisto, Vasfi Samimi (Visoka). Letero de Vasfi konvinkis Aziz veni en Albanion post kelkaj monatoj.

Sed, malfeliĉe, antaŭ tio, Vasfi estis akuzita de Ŝtata Sekureco Komunista pro "agitacio kaj propagando" kontraŭ Ŝtato kaj Partio. Oni tuj arestis kaj prijuĝis lin. Sekvis politika enprizoniĝo.

Sed kiamaniere oni pravigus al altestima amiko Aziz tiun aferon? Ĉu Vasfi malsaniĝis kaj enhospitaliĝis? Tute ne, Aziz tuj petus viziti lin en la hospitalo. Ĉu diru ke Vasfi forvojaĝis jam? Ne, Vasfi devus atendi sian amikon malnovan. Ĉu li enprizoniĝis? Nenie! En Albanio oni ne povas enprizoniĝi pro politikaj kialoj !...

Finfine, oni decidis diri ke Vasfi mortis. Tiucele, la ŝtata funebra entrepreno aranĝis ankaŭ tombon kun foto kaj datoj de naskiĝo kaj morto de la povra Vasfi.

Elstara verkisto turka alvenis atendata ĉe aeroporto de altranguloj de Ligo de Verkistoj. Lin eĉ akompanis mem verkisto Ismail Kadare, nune plej konata internacie albana literaturisto. Dum vizito al muzea urbo 2400 jara Berat, Aziz Nesin ege raviĝis pro ties beleco kaj ŝerce demandis "ĉu ni ne devas pagi pro tia beleco!"... Li vizitis ankaŭ la "tombon" de sia amiko Vasfi kaj surmetis florojn.

Reveninte Turkion Aziz Nesin kunportis belegajn impresojn el lando balkana kaj maĝojon pro morto de sia amiko Vasfi Samimi.

Post elprizoniĝo, s-ro Vasfi daŭre verkis. Hodiaŭ li ne plu vivas sed postlasis almenaŭ 28 volumojn da scienca laboro surkampe de ĥemio, historio kaj albanologio.


verkis kaj sendis **Bardhyl Selimi**
el Albanujo

* Rakonto laŭ mia kolego verkisto, s-ro Naun Kule



verkis kaj sendis Bardhyl Selimi, el Albanujo

AZIZ NESIN (20/12/1915-06/07/1995)




Aziz Nesin estis ĵurnalisto kaj verkisto ĉefe de humuraj rakontoj kaj romanoj. Sed li estis pli ol verkisto de humuraĵoj. Tia verkisto kiu povus ekaperi el la ordinara popolo de iu lando. Kiam li, iam diris, ke 60% de la popolo en Turkujo estis idotoj, iu doktoro alportis la kazon al la juĝejo pro ke li

estis mokata de Aziz Nesin. En la juĝejo la juĝisto demandis al Aziz Nesin ĉu li vere elparols tiujn vortojn aŭ ne. Aziz Nesin respondis "Jes mi tiun votojn ja elparolis, tamen mi diris nenion pri la 40% de la popolo. Kiel tiu doktoro ekkaptiĝis en la ideo, ke li troviĝas en la plimulto?" Kompreneble la doktoro ne povis respondi al tiu demando kaj la juĝisto fermis la kazon. Aziz Nesin elirinte la juĝejon, li alparolis al la ĵurnalistoj, kiuj estis atendantaj lafinon de la kazo ekster la juĝejo: "Hodiaŭ per juĝa decido estis pruvita, ke la 60% de la popolo ja estas idiotoj!"

Ni kliniĝas antaŭ lia memoro post 23 jarojn de lia morto (06/07/1995).

SERENAJ MATENOJ



Esperanta eldonejo "Libera" eldonis la novan romanon de Julian Modest "Serenaĵoj".

En suna aprila tago en mara urbo subite malaperas Klara, bela, talenta knabino, lernantino en la lasta gimnazia klaso. Ĉu oni forkaptis ŝin por

ĉantaĝi ŝiajn gepatrojn pri mono, ĉu por prostitui ŝin eksterlande aŭ iu murdis ŝin? Al tiuj ĉi demandoj devas respondi la polica komisaro Kalojan Safirov. La romano, kies stilo kaj lingvaĵo estas klaraj, taŭgas por esperantistoj komencantoj.

Oni povas mendi la romanon de: Eldonejo "Libera" Lode Van Velde: lodchjo@yahoo.com

EKRA 2018 - Tria kaj Speciala premio en poezio

<p>HEJMO</p> <p>„ La tuta tero estas nia hejmo „ Jes, iasence. Por vi la hejma domo estas for, vi havas novan domon, en nova urbo aŭ vilaĝo, ie en la mondo. Vi ellernis novan lingvon – Envias vin la restintoj, ja vivas vi pli komforte, posedas pli da havaĵo - jen por envio kialo.</p> <p>Pasas jaroj, la tempo ne haltas, kaj nekredeble: vi aĝas! Pene iras ĉiu tago - sola vi estas. Vesperiĝas. Vi malŝaltas la elektron, enlitiĝas –</p> <p>Kaj eklumetas petrola lampo - en via hejma naskiĝvilaĝo ! Vi iĝas infano. Patro kaj panjo vivas, sonas la hejma lingvo. La forno donas varmon de brulanta ligno; mankas elektro,</p>	<p>patro hakis la lignon, panjo bruligis en forno. Ne estas bruoj de televidilo – nur mallaŭta diskuto de panjo kun paĉjo antaŭ la endormiĝo- en la hejma lingvo.</p> <p>Kie estas la hejma domo? Kie panjo kaj paĉjo? Kie la vera hejmo?!</p> <p>Baldaŭ ankaŭ vi dormos por ĉiam - kaj ilin renkontos...</p> <p>Verkis Lenke Szasz el Rumanio Tria premio pri poezio en EKRA 2018 konkurso</p>	<p>MI AMAS VIN</p> <p>“Mi amas vin”, – mi ripetadas verve, Kaj en anim’ denove floras verde Enorma hort’. Kaj fruktoj de ĉi sort’ Pli elokventas, ol la viv’ aŭ mort’. Dolora or’! Kaj tia estas ver’... Ve!</p> <p>Kvazaŭ fantom’, sekvante kaŝobserve, Mi perdas vin kun tim’ ĉe via pord’ . Ne pufparol’, necesis sola vort’... Mi amas vin!</p> <p>Kaj kion fari? Ami senrezerve... Nin ebrigus floroj, suk’ de l’ herboj, Se vi konsentus vivi en konkord’. Sed pli kruelas, certe, monda ord’ ; Pikas skribaj’ obsede kaj acerbe – “Mi amas vin”...</p> <p>Verkis Evgenij Leonidoviĉ Georgiev el Karaganda, Kazahio. SPECIALAN premio pro ciklo da poemoj en EKRA 2018 konkurso</p>
--	--	--

EKRA - 2018 en Razgrad, Bulgario por 29a fojo

La 01an – 03an de junio en Razgrad, Bulgario okazis por 29a fojo jam tradicia Esperantista Krea Renkontiĝo “Abritus”, organizita de la Esperantista Domo pri kulturo “D-ro Ivan Kirĉev”. En la programo de la festo estis prezentita plej nova libro de Ivaniĉka Maĝarova “Sortoj sur vojkruciĝo” kaj estis anoncitaj la rezultoj de la du konkursoj – la Internacia konkurso por originala esperanta poezio kaj humuro kun prezidanto de la ĵurio Venelin Mitev – elstara bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, esperantisto kaj ĵurianoj: Josip Pleadin – elstara kroata verkisto, eldonisto, esperantisto kaj Ivaniĉka Maĝarova – longjara esperantistino kaj verkistino; La dua konkurso por traduko el bulgara okazas por 5a fojo. Ĝia ĵurio konsistas el: Marina Kumanova – prezidanto, denaska esperantistino kaj instruistino, D. Kateva – instruistino, filologo kaj M. Georgieva – multjara esperantistino, instruistino. Partoprenis 12 personoj el 6 landoj.

sendis **Dimitrinka Kateva**

prezidanto de la Esperantista Domo pri kulturo en Razgrad, Bulgario

Saint-John Perse (ne lia vera nomo ! Lia vera nomo, preskaŭ tiom bizara, estis Alexis Saint-Léger Léger, li prenis apartan nomon kiel verkisto, ĉar lia vera nomo estis konata en alia tereno, diplomatio, kaj do li ne volis miksi), ricevis la Nobel-premion pri literaturo en 1960. Li estas unu el la plej elstaraj francaj poetoj. Sed traduki lin esperanten estas malfacile, lia stilo solena, plena je raraj vortoj kreas malfacilojn. Sed aliflanke li verkas en prozo, do ne problemas la versan formon, cetere estas facile izoli frazojn aŭ alineojn el liaj longegaj verkoj. Mi malkovris ĝin iam kiam en liceo, multon ne komprenis, sed regule revenas al li kaj pli bone komprenas, ĉiam iom pli. Do lasta defio restanta : rekrei la saman magion de emocio, kiun oni sentas legante aŭ memorante la originalon. Tial mi elektis elĉerpaĵojn el ili. Jen :



lokoj de insult' kaj malkonsent', kaj kiuj libere sin regalis inter la mond', ho tutaĵa mondo de la aĵoj ! Kaj kiuj vivis sur la firstoj de l'futuro kvazaŭ ĉe l'argilaj flankoj de l'potisto.

(en « Anabazo »)

Mi foriros kun anseroj en la sobra odor' de l'maten'.

(en « Ventoj »)

Mi iras ho memor' ! je paŝo de viro libera, senhorda, sentriba, mez la kanto de sablhorloĝoj kaj, kun frunto nuda laŭrkronita per abeloj el fosforo, malsupre de ĉiel' tre vasta, verdŝtala kiel en marfundo, fajfvokante mian genton el Sibiloj, fajfvokante mian genton el nekreduloj, mi dorlotas plu, reve, per mano, inter tiom da estaĵoj nevideblaj, mian hundinon en Eŭropo, kiu estis blanka kaj, pli ol mi, poet'.

(en « Ekziloj » - verkita dum ekzilo en Nov-Jorko pro la 2a mondmilito)

Kaj poste venis neĝoj, unuaj la neĝoj dum foresto, sur vastaj la larĝoj veftitaj de rev' kaj realo ; kaj je ĉia sufer' indulgitas homoj memoremaj, ekestis freŝo tolaĵa sur la tempioj niaj. Kaj estis je l'maten', sub ĉiel' griza l'frumatena, iom antaŭ la sesa hor', kiel en refuĝa haven', ejo el graco kaj el danko kie liberigi l'svarmon de la grandaj odoj de l'silent'.

(en „Neĝoj“)

Poezio por akompani iron de recitmarŝo honore al l'maro. Poeziaĵo por subteni kanton dummarŝan tutĉirkaŭ lime la maron. Tiel, kiel la ago de la altar-ĉirkaŭiro, aŭ la orbitado de ĥoro dum disfaldado de l'strofo. Kaj tio estas mara kanto tia, kia neniam estis tia kantata, kaj estas la ennia maro, kiu ĝin kantas.

(en « Maraj gvidpunktoj »)

Ha ! Ne estu al mi mastro dura per silento kaj malĉeest' : Direktilisto tre kapabla, amoristo tro zorgema ! Havu havu por mi pli ol memdonecon. Ĉu amanto vi ne amos ankaŭ esti la amato ?

...

Timas mi, kaj maltrankvilo sidas sub mia brusto. Foje la koro de l'viro foren iras kaj sub la okularko videblas kiel desub la grandaj solecaj arkaĵoj tiu tregranda ampleksaĵo de la maro stare je la pordoj de l'dezerto.

...

Vi striktigos la stringadojn viamanajn sur miaj

Mia ĉeval' haltinta sub la arbo kveroplana, mi fajfas fajfadon eĉ pli pura . . . Kaj pacon al tiuj, kiuj nun mortos, ne vidintaj tagon ĉi. Sed pri mia frato l'poemisto, informojn ni ricevis. Plian li verkis aĵon plej dolĉan. Kaj estis homoj, kiuj legis ĝin.

(en « Kanzono »)

Vi 'stas kuracinto, asociinto, kaj sorĉinto je la altaj fontoj mensaj ! Ĉar ĉia kapablo en homa la koro strangas, kaj grandas alifacilo al inter ni via : treallogema homo ! kun cent kutimoj inter ni, ho disigitulo ! Ni la stampon de via rigard' surhavas ĉiuj sur la frunt' !

(en « Amikeco de l'Princ' »)

Multaj aĵoj surteraj kaj por aŭdi, kaj por vidi, aĵoj inter ni vivantaj.

(en « Anabazo »)

Tioma mildo en la homa koro, kial povas esti, ke mankas al ĝi, ke ĝi alĝustiĝu ? ...

(en « Anabazo »)

Agroj de l'rev'. Pri domkonstruo ni ne parolu !

(en « Anabazo »)

Kreskantaj ili estis grandaj fortoj sur ĉiu fac' de ĉi mondo, kaj kiuj naskiĝis pli alte ol en niaj kantoj, en





Saluton,


En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Alfred Jules Ayer (1910-1989)

Fi ! Hura !

Ĉu ne estus bone kompreni se iu parolas mesogojn aŭ pri ne veraj aferoj? Kaj ankaŭ kompreni se iu teksto rakontas verajn aŭ neverajn aferojn? Ayer pensis ke li jam trovis manieron malkovri tion. En 1930 li vizitis



Vienon kaj pasigis kelkajn monatojn en rondo de filozofoj kaj sciencistoj kaj post tio li revenis al Oksfordo, kie li estis instruisto. Kiam li estis 24 jaraĝa li verkis libron "Lingvo, Vero kaj Logiko" en kiu li asertis, ke la historio de filozofio estis plena je sensencaĵoj. En sia libro li alte laŭdis sciencon kiel la plej grava atingo de homaro.

Por Ayer, metafiziko, pri kiu parolis Kant (TS #21), Hegel (TS #24) kaj Schopenhauer (TS #25), estis malpura koncepto. Li forte kontraŭis ĝin. Li nur interesiĝis pri logiko kaj veraj sentoj. Sed metafizikon oni uzis pri aferoj, kiuj ne estis eblaj pridemandi pere de sciencaj konceptoj. Lia libro kolerigis multajn homojn, ĉefe la pli maljunajn en Oksfordo, do li ne povis trovi facile laboron. Tamen kolerigi homojn estis trajto de filozofoj ekde Sokrato (TS #2).

La maniero de Ayer distingi la sencohavan aserton el la sencan estis :

- (1) Ĉu ĝi estas vera je difino?
- (2) Ĉu ĝi estas empirie pravigebla?

Se ne ekzistas jesaj respondoj al ambaŭ de ili, tiam la aserto estas sensenca kaj tute ne utila al filozofoj. Komprenible estas "analizaj asertoj", kiuj estas veraj je difino. Ekzemple "ĉiuj fratoj estas viraj". Sed "sintezaj asertoj" bezonas esti empirie pravigeblaj kaj ili tiam provizas nin per aŭtentikaj scioj. Por pravigi tiajn asertojn ili devas esti observeblaj kaj testeblaj. Eĉ se la aserto ne estas pravigebla ĝi ankaŭ estas

akceptebla kiel "fakta aserto" kaj ne sensenca. Ĉu la aserto estas ne vera je ĝia difino, aŭ ne estas maniero pravigi aŭ malpravigi ĝin empirie, nur tiam ĝi estas sensenca.

Ayer re-ellaboris la ideojn de David Hume (TS #19) por la 20-a jc. Li ne nur atakis metafizikon sed ankaŭ moralon kaj religion. Por li moralaj juĝoj estis laŭvorte sensencaĵoj. La aserto "Torturo estas malĝusta" montras nur viajn personajn emociojn pri la afero: "torturo estas fi! Fia!" do ĝi ne estas vera je difino. Oni ne povas pravigi aŭ malpravigi ĝin ĉar laŭ Ayer ne ekzistas maniero testi ĝin. Sed Jeremy Bentham (TS #23) and John Stuart Mill (TS #26) pridisputus tion ĉar ili enkalkulus ties rezulton de feliĉo por la homo.

La aserto "kompato estas bona" nur montras vian emocion : "kompato estas hura!". La teorio de Ayers pri moralo estas nomata "Fi! Hura!". Tamen Ayer ne provis diri "moralo ne gravas". Li nur provis diri ke moralaj pridiskutoj estas sencencaj. En iu alia ĉapitro de la sama libro li atakas la ideon ke oni povas fari signifajn pridiskutojn rilate al religio. La aserto "Dio ekzistas" estas ne vera nek malvera. Ĝi ne estas vera je difino por esti taŭga por pridiskutoj. Ayer estis nek "teisto" nek "ateisto" li estis "agnostikulo".

Poste, iam, Ayer travivis sufokiĝon pro io, kiun li manĝis. Lia koro haltis por kvar minutoj sed li poste reviviĝis. Dum tiu tempo li diris ke li vidis ruĝan lumon kaj du "majstrojn de la universo" parolantaj unu al la alia. Tiu vizio ne faris lin kredanto de Dio sed li komencis pridemandi ĉu la menso daŭras pensadon post la morto.

Bedaŭrinde la teorio de Ayer pri logika pozitivismo ankaŭ ne pasis lian teston. Unue ĝi ne estas klare se ĝi estas vera je difino. Kaj due ne ekzistas observado por pravigi aŭ malpravigi ĝin. Do je liaj standardoj ĝi ankaŭ estas sensenca. Por tiuj kiuj turnis sin al filozofio pri kiel vivi pli bone, la teorio de Ayer ne estas utila. Tamen la teorio de ekzistadismo de pli postaj jaroj montiriĝis esti pli utila por tio.

(daŭrigota)



Tion faris la estro de tiu ejo, Camaleón, en Sada, la sinmelkulo havis min sur sia nigra listo. Unu nokton li sendis al mi du ulojn, kiam mi eldiskotekiĝis, kaj ili draŝis min ĝismorte, dispecigis mian vizaĝon. Mi nenion pepis, ne estas sufloranto, sed la hospitalanoj denunciis la batadon al la polico, la polico denunciis al la tribunalo, kaj la advokatoj konsilis, ke mi petu de dentisto kostotakson por remeti la dentojn, tiu ulaĉo de la diskoteko ruliĝas en oro, kaj la advokatoj diras, ke li pagu la koston, nu, la dentisto elbuŝigis, ke tio estos kvin mil tricent eŭrojn, putina madono, sed ili devas fari al mi amason da aferoj, gigagdu, ili devag deŝigi ĉi dentojn por bone reloki la makzelon. Ha, sed la farinton mi kaptis monatojn poste kaj mi ja beligis lin, mi venis al li kun basbala batilo kaj mezuris lin per ĝi, tiel, bam!, prenu, fiulo, prenu!, la spinon mi fendis al tiu kacosuĉulo.

* * *

Kaj mi leviĝis, genuiĝis sur lin kaj alpremis mian sekson al lia vizaĝo, femur-tenante lian kapon. Li ankoraŭ dormis sed reciprokis, kaj mi, plej leĝera kaj plej bela amazono en la mondo, vigle rajdis sur mia edzo, saltante super heĝoj, krakigante la vojrandajn branĉojn, kondukante miakokse la beston, kiu portis min al paradizo.

* * *

Ŝi ne povis rehejmiĝi. Li atendis ŝin ĉe la pordo, vidis ŝian kapon dum ŝi descendis laŭ la strato, ĝuste en la loko, kie li pensis. La knabino, kun bateganta koro en la brusto, retropaŝis kaj ĉirkaŭiris la kontraŭan angulon. Fojon post fojo ŝi rigardis malantaŭen dum ŝi ringis la domblokon kaj rifuĝis ĉe la montrofenestroj de vendejoj, kun okuloj nebulaj de timo kaj streĉiĝo. Eĉ ne restis al ŝi mono en la poŝtelefono por voki al sia hejmo. Kaj kion ŝi povus fari, se ĝi restus? Kiun kredeblan, naivan mensogon povus igi ŝian patrinon descendi kaj eskorti ŝin revene al la apartamento?

* * *

La ŝultroj skue faligas la bluzon, dum la manoj malbutonas la jupon, tuj glitantan sur la femuroj ĝis la piedoj kun bele lakitaj ungoj; la manoj surdorse malagrafas la mamzonon kaj liberigas la mamojn, kaj la polmoj pesas ilin dum ili karesas la cicojn, aŭtomate elstarajn; la kalsoneto ĉemaleolas, gambo leviĝas, ke la punto falu surplanken; jen ŝi, mi, nuda

kaj perfekta kiel neniam antaŭe, kliniĝanta al la lito kaj celanta min per ronda mammo, dum mia voĉo flustras ŝialipe: "Per pliaj tridek vi rajtus tutnokte resti".

* * *

Li kaŭriĝas apud la pordo de mia aŭto, metas sian vizaĝon ĝuste kontraŭ la mia. Li odoras je kolonjakvo kaj tabako

— Vidu, vidu... Adela. Kiom da tempo pasis. Kio pri via vivo?

Jen lia razita, blankeca, pufa vizaĝo, kun ombroj sub la palpebroj. Lia aspekto estas tiel malsama! Kaj tamen temas pri li. La hararo nigras, eĉ ne unu sola blanka haro troveblas. La oreloj estas malgrandaj, gluittaj al la kranio. La dentoj perfektas, ege blankas. Li instruis al vi kiel brosi la dentojn, ĉu vi memoras? Antaŭ ĉiu midzo li atente kontrolis ilin al vi. Antaŭ ĉio, higieno. Higieno.

* * *

Kiam vi preterpasas trinkejon, vi vidas knabojn: purajn vizaĝojn, apenaŭ dekok-deknaŭ-jarajn, la plej bela rigardas al vi kaj diras ion al la alia, kaj vi ridetas, kaj vira voĉo sonas laŭ via paŝ-kadenco, honore al vi, "vidu tiun dikulinon, ŝi ŝajnas frago kun kremo". Kaj vi putras surloke – ranciĝinta kremo, tromatura frago. Se la pak-papero, ĝisdetale prizorgita, malsukcesis en la ekzameno, kiel povus triumfi la enhavo, tiom senhonte difekta?

* * *

W estis kurioza persono, ĉiam kun bluso sur la lipoj. Li parolis tre fluan anglan, kiun li lernis, kiel li mem klarigis, de sia patrino, putino ĉe bordelo apud la usona militbazo de M. Liaj tre rudimentaj scioj pri la hispana havis pli ordinaran originon. Kiam li estis dekokjara, li laboris tutan vintron en germana buĉejo por permesi al si oran someron sub la suno de Majorko. Li ne tro ĝuis sian restadon sur la insulo – li diris, ke sur la strando li devis fermi la okulojn por ne sveni; tiom da nuda ĉirkaŭanta karno memorigis lin pri tiu koŝmara vintro en la buĉejo – sed ioman lingvon li ja lernis. Laŭ lia aserto ĝuste en Hispanio li riĉiĝis. Li ne klarigis kiel, kaj mi preferis ne demandi.

* * *

— Ek, senpeziĝu.

— Ha, dankon, do mi havas vian permeson? Ĉu vi volas aŭskulti mian tutan direndon? Mi abomenas viajn lipharojn: Ĉiufoje, kiam mi kisas vin, ŝajnas al mi, ke mi englutas anguran puloveron; viaj krurharoj estas jukigaj; kaj tiu karbe nigra pot-skrapilo, kiun vi havas inter la kruroj, vomigas min. Ĉu sufiĉe?



— Do kial vi plu estas kun mi?

Se ŝia hararo ne odorus tiel bone, nenio estus okazinta. Sed ĝi odoris je tabako, kaj jaron antaŭe mi ĉesis fumi, kio bedaŭrinde rehavigis al mi la flar-senton. Krome, ŝiajn tre longajn gambojn ne eblis preteratenti.

— Venu – ŝi diris.

Kaj mi venis. Komprenoble mi venis.

"Trans la strato, apud senkonstrua kampo, troviĝis la aŭto de la patro. Ĵus lavita. Li plurfoje paŝis ĉirkaŭ ĝi, tintigante la domŝlosilojn en sia poŝo. "Kun kiu aŭto vi majestas, tia vi estas", la patro oftege ripetis".

Nova Esperanto libro verkita de Begoña Paz kaj tradukita de Suso Moinhos.



Begoña Paz naskiĝis en 1965 en Koruno, Galegio. Ŝi studis anglan filologion, postgradajn studojn pri genro kaj perforto, kaj magistriĝis pri hispaniaj literaturoj kun aparta fokuso

sur la eŭska, kataluna kaj galega. Ŝia unua proza libro estis La vundo (A ferida, 2004), kiun sekvis la romano La plej bonaj intencoj (As mellores intencions, 2008) kaj la poemaro La malbona vivo (A mala vida, 2011). Ŝiaj tekstoj publikiĝis en pluraj antologioj kaj kolektivaj verkoj. En 2005 eldoniĝis Norocai, ŝia unua infanlibro.

La libro estas publikigota de Mondial eldonejo. En la kovrilo estos la bela bildo de la profesia fotistino Evelina Karbowskiak Karezona.



La maro de la lingvoj

Junaĝe li pensis, ke sia gepatra lingvo sufiĉos komprenigi sin ĉie en la tuta mondo. Li ne kredis, ke alvenos tago de la rekono, ke per tiu ĉi amata lingvo estas perdita eksterlande.

Vane li malfermas buŝon por paroli, la tieaj homoj strange rigardas al li, kaj ili ne komprenas liajn pensojn.

Tio ege dolorigis lin. Ja, lia patrino tiom dolĉe fabelis al li en tiu ĉi lingvo.

Kial tiuj homoj ne komprenas lin? Lia lingvo estas facila kaj belsona. Neeble, ke ekster la landlimoj oni ne komprenas lin.

Kiom da lingvoj ekzistas?

Li naĝas en la maro de l' lingvoj, sed li sentas de tempo al tempo elĉerpiĝas la forto, kaj baldaŭ li droniĝos en la lingvojn.

Li deziras kriegi: „Help'!”, sed voĉo ne elvenas el sia buŝo. Kial ĝi elvenus, kiam neniu komprenas lian parolon.

Hejme li ĉiam ridis pri eksterlandanoj, kiel ili balbutadis. Ilia vizaĝo estis komika.

Nun la mondo turniĝis. Lin ĉirkaŭas multaj, eĉ multegaj lingvoj. Ili sufokas la lingvoj.

Liberiĝi de ili. Sed kiel?

Li ne sciis. Ellerni ĉiom da lingvoj li ne estas kapabla. Eĉ sur la tergloblo neniu!

Kio estas la solvo?

Help'! – Sed rapide, ĉar baldaŭe li droniĝas en la maron de l' lingvoj.

Televido parolisto

Antaŭlonge en la praepoko de la televido vespere ankoraŭ virinoj laŭtleĝis fabelojn por la infanoj.

En iu vespero neatendite, en la lasta momento la televido parolistino malsaniĝis, kaj anstataŭ ŝi, iu virkolego estis petita fabeli.

- Saluton, infanoj! – salutis la etulojn dece la kvindektri jara barbulo.

- Mi estas hirundopatrino..... li daŭrigis kaj ĝi vidiĝas sur la iama surbendigo, ke la kameraisto baskuligas la kameraon pro la ridaĉo.

La fabelanto la barba grandulo daŭrigas: - Ĵus mi estas sidanta sur miaj ovoj..... laŭ la iamaj kolegoj la sonisto kun ĉiuj meblitoj kaj helplaboristoj kaŝe forlasis la ejon, ĉar ili peskaŭ mortis pro la ridegaĉo.

Laste la kameraisto eliris ekaŭdante la sekvan:

- kaj el la nesto elpendas mia bela vosto.



la unuan rakonton verkis la duan tradukis el hungara lingvo **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

Ĉi somere, mi partoprenis la 103-an Universalan Kongreson (UK) en Lisbono, Portugalio kaj 73-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Badaĥozo, Hispanio. Ĉi tiuj estis miaj triaj UK kaj IJK en kvar jaroj (mi ne partoprenis la pasintan jaron). Mi havis bonegan sperton kaj plene suferis post-esperantan renkontiĝan sindromon por la tuta semajno post mia reveno. Do jen kelkaj pensoj pri mia sperto.

La plej frapa afero estis la vetero, kiu fakte estis granda problemo. En Lisbono, la varmeco estis ĉirkaŭ 35 gradoj ĉiutage, do mi ne turistumis aŭ vidis multe el la urbo ĉar estis tro varma. En Irlando, pli ol 20 gradoj estas varma tago, do mi apenaŭ eliris la kongresejon dum la tago. La kongresejo estis ankaŭ tre varma kaj estis surprizo por mi ke ĝi apenaŭ havis klimatizilon. Nur estis iuj en la plej novaj ĉambroj kaj oni ne ĉiam enŝalutis ĝin. La koridoroj kaj manĝejo ne havis klimatizilon, kiu estis problemo ĉar ne estis ie kie oni povis ripozi kaj umi ekster la prelegoj. Sed la plej granda problemo estis ke mi malfacile povis dormi en mia gastejo.



UK plenis je maljunuloj. Ĉi tiu estas kutima afero, sed mi forgesis kiel multege da maljunuloj ĉeestas. La averaĝa aĝo certe estis pli ol 70. La Nitra UK havis relative grandan junularan programon, sed nun

mi scias ke tiu ĉi estis la escepto. El la 1,500 partoprenantoj, mi dubas ĉu 50 estis la TEJO-aĝo. UK montris al mi la gravecon de la divido de la esperanta movado laŭ aĝo. Iuj malkonsentas, sed laŭ mi, estas tute klara ke junuloj kaj maljunuloj havas malsamajn interesojn kaj ŝatokupojn. Tiu, kiu interesas maljunulojn ofte ne interesas junulojn. Eĉ la junulara programo ne estis sekura loko, ĉar eĉ tie venis maljunuloj, kiu preferis diskuti tedajn aferojn ol amuziĝi (kompreneble ĉi tiu estas mia persona opinio, sed damne, kreu min kiam mi diras ke mi devis aŭskulti longajn seninteresajn paroladojn). Ekde nun, mi volas partopreni nur junularajn renkontiĝojn.

Ne vere estis junulara programo aŭ iu lokano, aŭ juna portugalo kiu povis montri la urbon al ni. Kelkaj TEJO estraranoj provis organizi noktan programon, sed estis iu "lastmomenta" kaj "spontena" sento al la okazaĵoj. Plejparte la programo nur estis iri al la junulara gastejo por babili. Ofte tiu sufiĉas, ekzemple la plej bona

nokto estis tiu de la kultura festivalo. Sed ofte estis nebezonataj aferoj, kiel la granda fuŝo pri la intervjuo. En alia kunteksto (ekzemple dum la taga programo) la intervjuo estus amuza kaj interesa, sed en loko kiam oni volis senŝtreĉiĝi kaj diboĉi, unu horo intervjuo pri la komitato de UEA estis tro longa kaj tro enua (la maljunuloj tre ĝuis ĝin kaj daŭrigis ĝin per enuaj demandoj). Do, mi kaj kelkaj amikoj foriris kaj drinkis surstrate (tre amuza) kaj avertis ĉiujn enirontojn.

La taga programo estis bona sed ne bonega. Estis iuj interesaj prelegoj, principe la aŭtoraj duonhoraj, sed multaj ankaŭ estis tedaj. Ekzemple, mi iris al prelego kun interesa temo, sed la preleganto nur legis paperon kun teda voĉo. Ofte la prelegantoj pensis ke nur sufiĉis paroli esperante, ili forgesis ke oni ankaŭ devas paroli interese kaj vigle. Bedaŭrinde mi frue eliris multajn prelegojn pro manko de intereso. Okazis multaj bonaj koncertoj kaj la plej famaj muzikistoj en Esperantujo ĉeestis, sed malfacilis danci en la koncertejo (kvankam kelkaj provis). Mi maltrafis grandan parton de la piedpilka matĉo ĉar mi amuziĝis kun amikoj, sed ne gravas ĉar ili malvenkis (grande).



Komuna foto dum UK 2018

Poste mi iris al IJK kiu estis tute alia sperto. IJK estas tute neforgesebla sperto kun multege da amikoj. Mia sola bedaŭro estas ke ĝi estis tro mallonga ĉar estis multaj homoj mi ne havis la ŝancon babili aŭ kiel multe tiel mi volis.



La vetero en Lisbono estis varmega, sed ne estas vortoj por la varmeg-ego de Badaĥozo. Estis 45 gradoj dum la semajno do esti ekstere estis ne eltenebla. Por atingi la lokan buson al la kongresejo oni devis marŝi dum 5 minutojn, kaj eĉ tiu estis

apenaŭ eltenebla. Almenaŭ la kongresejo havis klimatizilon kaj la ĉambroj havis ventumilon. Oni vere devis pripensi strategion por esti malvarma – mi rekomendas fermitajn ĵaluziojn kaj fenestrojn dum la tago kaj malvarma duŝo antaŭ enlitiĝo. Sed aliuloj opinias ke se oni ne povas dormi pro la varmeco, kial ne drinki kaj danci dum la nokto?

La kongresejo estis unu el la plej bona mi iam ajn vidis dum esperanta renkontiĝo. Kiel mi jam diris estis klimatizilo, sed ankaŭ naĝejo, do la varmeco ne malebligis la kongreson. Ĉi tiu estis la unua fojo mi aŭdis pri naĝejo en kongresejo, sed ĝi certe estas bonega ideo kaj verŝajne la plej populara loko. Sed la plej grava por sukcesa kongreso estas ke ĉio estas en unu loko. Oni ne volas la devigon promeni longe por atingi la loĝejon, manĝejon aŭ prelegejon, kaj tiu tute ne estis problemo ĉi tie. La manĝejo estis pli bona ol la kutimaj malaltaj standardoj ĉe renkontiĝoj. Estis bonkvalita kaj rapida interreto ĉie. Ankaŭ tre grava afero, estis granda komunejo kun multaj seĝoj, do oni povis facile sidi, babili, ludi ktp kaj trovi amikojn. Tiuj aferoj multe plibonigas la spertojn de la partoprenantoj.

Eĉ estis trinkejo en la kongresejo kiu estis malfermita ĝis la fino de la nokto kaj vendis tre malmultkostajn bierojn. Unu plendo estas ke mi trovis ŝraŭbon en mia glaso da oranĝa suko. Jes, ŝraŭbo. Ne, mi tute ne scias kiel ĝi eniris. La trinkejistoj estis tiel ŝokitaj kiel mi (kaj redonis la prezon de la suko).

La organizanta teamo estis malgranda kaj devis labori tre forte (Carlos ĉiam kuris ĉie). Ne estis iuj grandaj fuŝoj, ĉio plejparte funkciis. Estis iuj teknikaj problemoj (ekzemple la karaokeo) kaj la kultura festivalo ne iris glate. Ĝi okazis dum la unua plena tago, kiu estis dimanĉo, kiu signifis ke ĉio en la urbo estis fermita. Tial homoj ne povis aĉeti manĝaĵon/trinkaĵon kaj la stratoj estis tute malplenaj. Ni estis en la mezo de la urbo dum kelkaj horoj sed mi dubas ĉu pli ol 5 lokanoj vidis nin. Esti ekstere tiom longe tute ne eblas pro la varmeco, do multaj homoj kaŝis en la sola malfermita restoracio.

Ĉar mi nun estas komitatano B de TEJO, mi partoprenis la komitatkunsidojn por la unua fojo. Ĉi tiu estis interesa kaj nova sperto. Mi verkis **du artikolojn** por **Libera Folio** pri la kunsidoj kaj verŝajne diskutos ĝin denove en alia artikolo. Malfacilis aŭskulti, demandi kaj skribi notojn samtempe, pro tio miaj notoj ne estis tre klaraj aŭ detalaj, kaj mi verŝajne ne raportos denove. Mi lernis multe pri la interna politiko

de TEJO kaj havas bonajn esperojn por la nova estraro (nur unu el miaj preferitaj kandidatoj malvenkis). Mi estis sufiĉe aktiva komitatano kaj unu el la plej parolema kaj sendependa. Mi strebis respondecigi la estraron kaj ne silentis kiam estis iu afero pri kiu mi ne konsentis (aŭ komprenis). Estis kelkaj interesaj aferoj, kelkaj enuaj aferoj, kaj unu aŭ du kiuj surprizis min. Mi opinias ke esperantistoj tro emas eviti disputojn kaj preferas ŝajnigi ke ĉio iras glate kaj ni ĉiuj konsentas. Kompreneble, ni ĉiuj volas esti amikoj, sed kritiko helpas plibonigi la movadon kaj eviti malsukceson.

Eble vi aŭdis pri **la skandalo dum IJK**, kiam oni forpelis iun partoprenanton. Unue, mi volas laŭdi la organizantojn por la reago. Ili rapide reagis kaj klare anoncis la aferon (trilingve) al la partoprenantoj antaŭ la koncerto. Sed ankaŭ estis emo eviti la aferon kaj neniu volis diskuti la aferon. Multaj homoj ne sciis kion okazis (do ili devis legi Libera Folio) kaj tiuj kiuj ja sciis, ne volis diskuti. Se temis nur pri ordinara partoprenanto, mi konsentus ke oni ne bezonas scii lian nomon. Sed li ne estas ordinara partoprenanto, fakte temas pri alta persono en TEJO. Mi opinias ke almenaŭ la komitato rajtas scii ke temas pri estrarano (li ankoraŭ estas estrarano ĝis la fino de la monato). La fakto ke li ankaŭ estis kandidato por la estraro ankaŭ signifas ke liaj agoj estas publika intereso. Fakte mi estis voĉdononta por li kaj estis surprizita kiam lia nomo ne estis en la balotilo. Mi opinias ke la voĉdonantoj rajtis scii pri la neakcepteblaj agoj de la kandidato, ĉar imagu se la voĉdonado okazis kelkaj tagoj pli frue. Kio okazus se li irus al alia renkontiĝo (aŭ ĉu li estos malpermesita)? Li sendis amikpeton al mi per fejsbuko kaj mi estis akceptonta kiam mi eltrovis ke temis pri li. Mi komprenas ke oni ne volas ke homoj ĉasos lin, sed oni ankaŭ ne volas tro kaŝi kion okazis.



Komuna foto dum IJK 2018

Pro la kunsido mi havis malpli da tempo por amuziĝi (kaj dormi). Fakte mi festis tiel multe ĵaŭde ke kiam mi vekiĝis mi ankoraŭ estis ebria kaj nur postebriĝis dum la mezo de la tago. Bedaŭrinde tiu ankaŭ estis la tago de mia prelego (**baze de ĉi tiu blogero**). Mi estis tiel laca ke dum la prelego eĉ mi mem ne sciis pri kiu mi parolis kaj la ideoj kaj proponoj aspektis tute sensencaj eĉ al mi. Alia okazaĵo estis kiam mi kuris tra la flughaveno por renkonti belulinon antaŭ ŝi foriris al alia kontinento, sed mi maltrafis ŝin. Sed tiu ĉi estas rakonto por alia fojo.

Malfacilas klarigi kiel multe mi ĝuis IJKn. Estis multaj

bonegaj momentoj, babilante apud la trinkejo, ludante en la naĝejo, dancante dum la koncerto kaj amuzante kun amikoj. Multaj homoj diris ke ili legas mian blogon, do dankon al vi (kaj iu diris ke ŝi atendis seriozan homon kaj surpiziĝis kiam ŝi vidis kiel neserioza mi vere estas). Mi ĝuis la kongreson tiel multe ke mi preskaŭ ploris ĉe la fino. IJK estas la plej bona loko ie ajn kaj mi forte sentis la post-esperantan renkontiĝan sindromon. Eĉ nun, post dek tagoj, mia koro ankoraŭ estas en Badaĥozo

Fonto: <https://teokajlibroj.wordpress.com/2018/08/22/kelkaj-pensoj-pri-uk-kaj-ijk-2018/>.

Esperanto, lingvo ne facila por ĉinoj

Por ĉinoj, ĉu Esperanto estas pli facila ol aliaj fremdaj lingvoj? Jes, almenaŭ ĝi estas multe pli facila ol la angla.

Sed por ĉinoj, ĉu Esperanto estas facila? Ne! Por ĉinoj, ĝi ne estas facila lingvo, kaj eĉ oni povas konstati, ke ĝi estas malfacila lingvo.

Oni ofte legas, ke Eŭropano ekparolas flue en Esperanto post lernado de nur kelkaj monatoj. Sed tia ekzemplo estas sen-signifa por ĉinoj. Multaj ĉinaj lernantoj ne kapablas flue paroli Esperante eĉ post lernado dum pli ol 10 jaro!

Kial estas tia afero? Ĉu ĉinoj estas pli maldiligentaj aŭ pli mallertaj ol eŭropanoj je la lernado? Certe ne! Por eŭropanoj, Esperanto estas nur varianto de sia gepatra lingvo, sed por ĉinoj, ĝi estas tute nova fremda lingvo!

La prononco kaj gramatiko de Esperanto estas regulaj, kaj la ne-norma prononco kaj eraroj en la gramatiko fakte ne serioze influas la komunikadon per Esperanto. Por ĉinaj lernantoj, la plej malfacila punkto estas la vortoj, la 2500 bazaj vortoj, kiuj estas tute fremdaj por ĉinoj.

Sed tio ne estas problemo por eŭropanoj, kiuj konas grandparton de la tiuj vortoj sen lernado.

Eble iuj malkaŝe ridas: ĉinoj eĉ ne kapable memoras tiom da vortojn? Sed pensu, kiom da eŭropaj plen-kreskuloj povas memori 2500 ĉinajn ideografiaĵojn, kiom jam sufiĉas por kompreni ĉinajn ĵurnalojn kaj gazetojn? Por plejparte de plen-kreskuloj, ekster la reala lingva ĉirkaŭaĵo, lerni tute novan lingvon estas ege malfacila!

verkis Solis (Liu Xiaozhe) el Ĉinio

Estas klare, ke la kvanto de la vortoj estas obstaklo, kiun ĉinaj lernantoj devas konkeri.

Sed estas domaĝa, aŭ pli rekte dirite, estas abomeninda, ke eŭropaj esperantistoj ankoraŭ daŭre aldonas novajn vortojn ne-necesajn al Esperanto. Forlasinte vortojn longajn, sed facile memoreblajn, eŭropanoj aldonas vortojn mallongajn, sed tute fremdajn por ne-eŭropanoj, ekzemple, malrapida kaj lanta, maldiligenta kaj pigra, malnova kaj olda, ktp. Tio pli-malfaciligas Esperanton, kaj for-timigas la novajn lernantoj, kio fakte helpas la kontraŭstarantojn de Esperanto.

verkis Solis (Liu Xiaozhe) el Ĉinio

Fonto: <http://reto.cn/php/esperanto/esperanto-lingvo-ne-facila-por-cinoj/>



世界语，一种
对中国人来说
不容易的语言

Ĉu ĉi tiu skribo facilas al eŭropanoj?

GERSI – mia amiko el Brazilo

Ĉu la sorto estas kulpa, ke mi amikiĝis kun la esperantisto Gersi?

Mi ne scias, laŭ mi estis hazarde. Do, mi estas feliĉa havi tian erudician

korespondanton, kio ne estus eble, se ni ne estus esperantistoj.



Gersi Alfredo Bays – verkisto (La Profeto el Pedras, romano), eldonisto (de 170 libroj), poligloto (parolanta la portugalan, hispanan, italan, francan, anglan, Esperanton, eklernis eĉ la grekan kaj la latinan), membro de UEA kaj SAT, Dumviva membro, Honora membro de UEA, akademiano (inter la jaroj 2000-2009). Li ricevis la premiojn Grabowski kaj FAME (1996).


Li naskiĝis en 1934, komencis lerni Esperanton, kiel gimnaziano kiam li estis 13-jara. Lia scio pri tiom da lingvoj helpas lin en la eldonado kaj tradukado.

En 1980 li fondis la eldonejon Fonto, kiu fariĝis unu el la plej gravaj eldonejoj en la historio de Esperanto. Li eldonis kaj eldonas plurajn librojn en Esperanto,

originalaj kaj tradukitaj.

La sorto min karesetis – dum 2015 li eldonis mian infanlibron “Renkontoj dumvoje”.

Li tradukis la verkon (el la franca, de André Cherpillod) en la portugalan “Instrumentos Gramaticais do Esperanto”, kompilis frazeologian



verkis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario

verkon, kunigante “Domfabriko”n de Kalocsay kaj “Proverbaro”n de Zamenhof.

Impresas min, ke li multe legas kaj scias pri diversaj libroj kaj aŭtoroj.

En la jaro 2017 mi skribis al li pri la libro “Sub la jugo” de la granda bulgara verkisto Ivan Vazov. Kia estis mia surprizo, kiam li respondis, ke li havas la libron kaj legis ĝin en 1959. Tiam li estis junulo! La duan verkon kiun li legis estis LA FARAONO, kiun nun li mem eldonis, krom preskaŭ ĉiujn verkojn de Kabe.

Ofte mi lin demandas kiel li ripozas – “aŭskultante muzikon”, estas lia respondo.

Mi estas feliĉa kaj dankema, ke mi konatiĝis kun li, malgraŭ nur per leteroj.

Estu nia amikeco longviva!!



Aŭgusto 2018

verkis kaj sendis **Elena Popova**, el Bulgario

SERĈANTAJ ANIMOJ



"SERĈANTAJ ANIMOJ" * - unika libro, mirinda sintezo de la artoj: la belega kaj filozofia hajko-poezio de la aŭtorino kaj kolereca pentroarto de famaj kaj ne tre konataj al la leganto bulgaraj kaj ekstrelandaj pentristoj - rusaj, japanaj, franca,

skulptaĵoj de la bulgario Bogomil Jivkov. Unu libro - unu sorĉa vojaĝo en la rusaj arboj kun Ŝiŝkin, tra la fora Japanio kun Katsushika Hokusai, en maro inter boatoj, velŝipoj, fiŝkaptistoj, dvigataj de Ajvazovski kaj Todor Balev. En la libro vivas la bulgareco en la pentraĵoj de Maja Gorova...

Ni ekvojaĝu pere de la bonega libro de Elena Popova kaj la pentraĵoj de tuj admirindaj pentristoj!

D. Kateva

* "SERĈANTAJ ANIMOJ" estas la nova libro de hajkoj verkita de Elena Popova el Bulgarujo.

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilniusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el Litovio

-- oOo --

am ĉe iu terposedanto estis hundo, nomata Binzo, kiu estis de ĉiuj ŝatata. Sed la hundo maljuniĝis kaj la mastro pelis lin for. Nenutrigata hundo tre malsatiĝis. Vagante li renkontis lupon.

- Binzo, antaŭ iom da tempo vi estis tre forta. Kio nun okazis al vi?

La hundo kapkliniĝis kaj komencis eksplikadi:

- Nu, mia mastro forpelis min el la domo kaj plu ne donas manĝaĵon al mi. Kiel do, mi povas esti forta?

Jen la lupoj diras al la hundo:

- Se vi deziras, mi faros tiel, ke vi ree estos ŝatata de via mastro.

- Ho ve! Mi tre deziras! - ekĝojis la hundo.

Tiam la lupoj ekinstruis la hundon.

- Morgaŭ via mastrino iros por rasti fojnon kaj portos kun si sian malgrandan bubeton. Kiam ŝi sidigos la bubon surteren, mi kaptos lin kaj forkuros. Vi estu proksime en arbustoj kaj ekperseku min, mokcelante forpreni la bubon de mi. Kiam mi lin forĵetos, la mastrino ekĝojos kaj vi ree estos feliĉa. Nur diru al mi, kion vi pro tio al mi donos.

La hundo respondis:

- Kiam estos ĉe ni ia festeno, venu kaj mi ŝtelos por vi el kuirejo iom da viando kaj ostoj.

Do tia estis ilia interkonsento. Matene la mastrino, kunportinte sian bubon, foriris fojnon por rasti. Almenaŭ ŝi metis la infanon surteren, tuj aperis la lupoj, kaj kaptinte lin ekkuris al la arbaro. La mastrino ekvidinte tion laŭte ekkriis. Kaŭriĝanta ĉe arbusto Binzo ekbojis kaj la mastrino instigadis lin:

- Binzo, kuratingu la lupojn!

Binzo ĵetis sin post la lupoj kaj forprenis la infanon. La mastrino tuj kondukis la hundon hejmen ĝojante pri la forpelo de la lupoj.

Post ia tempo la mastrino aranĝis festenon. Alrampis tien ankaŭ la lupoj. Ekvidinte la lupojn, Binzo salutis lin kaj diras:

- Atendu ĝis la vespero.

Kiam la lupoj ĝisatendis la vesperon, Binzo ekŝtelportadis viandon kaj ostojn el la kuirejo. La lupoj satiĝis per viando kaj ekpetis pri trinkoj. Tiam la hundo diras:

- Iru en la domon. Tie ni trovos iom da biero.

La lupoj ektimis.

- Kiel mi iros? Iu povas rimarki min.

- Ne timu, neniu vin rimarkos.

La lupoj obeis kaj iris al la domo. Tuj Binzo alportis plenan kruĉon da biero. La lupoj lektrinkis ĉion.

Aŭdas la lupoj, ke homoj kantas, kaj ankaŭ li ekdeziris kanti.

- Ne kantu, - diras Binzo, - ĉar via voĉo ne agordiĝos kun la homaj voĉoj.

Sed la lupoj eĉ ne provas obei la hundon. Iomete silentinte li ekhurlis je tuta sia potenco.

Ekaŭdinte la lupojn hurladon, homoj ĉie ekserĉis lin kaj trovis enangule kurbiĝintan. Ili ekbatis lin kun la tuta ilia forto. La lupoj apenaŭ elkuris el la domo.

- Ĉu mi ne admonis vin, ke vi ne kantu, - riproĉas lin Binzo.

Ege ekkoleris la lupoj pri la hundo kaj tute ne aŭskultas, kion tiu diras. Kurante al la arbaro, li diris:

- Morgaŭ venu al la juĝejo kaj kunprenu siajn depozicianojn.

Binzo, invitinte katon kaj kokon iras al la juĝejo, kie ilin jam atendis lupoj kaj apro. Neĝisatendinte la lupoj ordonis al la urso supreniri arbon por esplori, ĉu ne videblas la hundo kun siaj depozicianoj. Suprenirinte la urso ekvidis ilin kaj alkriis la lupojn:

- Ho, fraĉjo, venas iaj fortuloj. Unu portas longan ponardon, alia tamburbatas kaj senĉese kriegas: "Ĉu estas iu ĉi-tie?" kaj la tria ŝtonojn kolektadas.

La lupoj tuj alkriis siajn depozicianojn:

- Ni kaŝu nin, ĉar estos tre malbone!

La lupoj eniĝis en branĉamason, la apro - en formikejon, kaj la urso kaŝis sin sur la pinto de piceo. Kiam la hundo kaj liaj amikoj venis al la konsentita loko, la kato tute neatendite ekvidis movetantan voston de la apro, per kiu li forpeladis la formikojn, pikantajn liajn flankojn. La kato opiniis, ke tio estis muso kaj kaptis la apran voston. La ektiminta apro ekkuris kaj la koko ne malpli ektimiĝinta, flugis en piceon. Kriegante: "Donu lin al mi! Donu lin al mi!"

La falinta el la piceo urso ĝuste trafis la lupojn. Ambaŭ forkuris en kontraŭajn direktojn. Kaj la hundo Binzo, restinta en la sama loko, gajnis la juĝaferon kontraŭ la lupoj.



"Casa dos Bicos" (Domo de Pintoj), ĉe Strato Bacalhoeiros (Moruo-Vendistoj), en Lisbono, estis konstruita en la komenco de la 16-a jarcento. Nuntempe ĝi enhavas ekspozicion pri arkeologio kaj la Fondaĵon José Saramago. Tie troviĝas dokumentoj pri la verkaro de tiu granda aŭtoro, sola reprezentanto de la portugala lingvo inter la gajnintoj de la Nobel-Premio. Jen nepra vizito por ĉiu alveninto en la bela urbo.



Tie sidas dokumentoj, filmoj, fotoj kaj libroj, multaj libroj. En la dua etaĝo, ekzemple, montriĝas tradukoj de libroj de la verkisto al grandega kvanto da lingvoj. Kio estas pruvo pri la universaleco de lia literaturo, de lia humanismo.

Nu, mi konstatis, ke ne troviĝas en tiu serio da libroj eĉ unu sola ekzemplero en Esperanto. Tamen, eldonejo Fonto, en Chapecó, ŝtato Santa Catarina, Brazilo, publikigis la

Rakonton pri Nekona Insulo, en Esperanta traduko, en la jaro 2006. Mankis transdoni al la fondaĵo la koncernan ekzempleron.

Tio jam ne mankas, nun. Tri tagojn post la fino de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Lisbono, inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2018, mi vizitis la Domon de Pintoj kaj transdonis al la tre simpatia S-ino Ana la menciitajn ekzemplerojn. Iom surprizita, ŝi vokis Pilar Del Rio, vidvinon de Saramago, kaj ni telefone interparolis.

Ni reciproke multe dankis.

Nun, nia Internacia Lingvo digne sidas en tiu nobla institucio.

Mi konfesas, ke mi emociiĝis.

verkis **Dr. Paulo Sérgio Viana**, el Brazilo



Fonto: <https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2018/08/esperanto-na-fundacao-jose-saramago.html>

La sorĉita ladskatolo

-- amuza mikrorakonto

Hieraŭ, miaj karaj samideanoj, mi eliris por la manĝaĉetado.

Mi estis en la vendejo, pripensante pri miaj aferoj, kiam mi sentis, ke iu frapetis sur mia ŝultro, kaj jen konata ina voĉo malantaŭ mi aŭdiĝis: "ehi bro! What the f**k are you doing here?"

Estis la reĝino Elizabeto !

"Ho!, via reĝa Moŝto ! Kiel vi fartas ? Kaj kial vi krokodilas ?" mi diris al ŝi, iom embarasite.

"Donu al ni tiun tinusan ladskatolon, tie, sur tiu breto, super via plebaĉa kapo!" ŝi ordonis.

"Ĉu "al ni" ? Sed... vi estas sola, kial vi diras "al ni" ?" mi demandis.

"Moŝta pluralo, vi stultulo ! Ni ĉiam parolas tiel !" ŝi diris, ŝargante sian aĉetĉareton per pezaj malmultekostaj boteloj da bieraĉo.


Subite aŭdiĝis strata bruego, kaj bela kuranta fianĉino, en blanka robo, eniris la vendejon, kriante:

"Reĝino, reĝino ! Mian estontan edzon jam manĝis krokodilo ! Kial via Moŝto ne alportis la tinusan skatolon ĝustatempe ?"

"Kulpas ĉi tiu plebo" respondis la reĝino. "Li nun, nepre devas edziĝi al vi, la princino. Ni ne povas seniluziigi niajn nobelajn invititojn !" ŝi aldonis.

Kaj... vespere okazis granda edziĝfestiĝo.

verkis kunlabore
Maurizio Brucco
el Italujo
Carlos Ymbernon
Torres
el Urugvajo



Fonto: https://www.facebook.com/groups/esperanto.grupo/?multi_permaLinks=10156337516990289



Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net (RITE)

estas reta studeblo pri instruado kaj metodiko, kreita por instruistoj kaj instruontoj de Esperanto. La kurso havos modularan strukturon kun libera lerno-ritmo.

La studoj estas malfermitaj al ĉiuj esperantistoj, kiuj plenumas la partoprenkondiĉojn kaj pagas la kursokotizon.

La kursaron funkciigas kaj pri ĝi respondecas E-duKati, oficiale registrita, nederlanda edukcela entrepreno, direktita de Katalin Kováts.

La partneroj de E-duKati en tiu formado estas:

- Fondaĵo edukado.net
- Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
- Akademio Literatura de Esperanto (ALE)
- Esperantologia fakto de Universitato Adam

Intervjuo kun la unua diplomito de RITE

IPR: *Gratulojn, Patrick Morando pro la sukcesa fino de la Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net. Ni scias, ke vi estas la unua, kiu finis tiun kurson. Kiel vi fartas? Kion tio signifas por vi?*

PATRICK: Saluton kaj dankegon pro viaj gratuloj. Mi fartas tre bone kaj nun, fininte la kurson, eĉ pli bone! Mi estas vere kontenta, tiu kurso por mi estis granda defio. Kvankam mi studis fremdajn lingvojn (francan lingvon kaj ĝian literaturon) en la universitato en Ĝenovo, Italio, tamen vere mankis io, kio rilatis al metodiko, al tio kiamaniere oni instruas fremdan lingvon. Fine de la 90-aj jaroj, kiam mi vizitadis la universitatajn kursojn, la programo estis nur pri lingvo, literaturo kaj pri aliaj fakoj (historio, lingvistiko). Klerigado pri metodiko ne estis proponata, do la plimulto de la studentoj havis tiun „handikapon”, ili akiris grandan kulturalan kompetenton, sed nenion pri didaktiko. Nur post 2003 ekestis specialiĝoj pri tio.



IPR: *La kurso konsistas el 7 studobjektoj: metodiko, gramatiko, movadhistorio, literaturo, frazeologio,*

Miczkiewicz (UAM)

-- Esperanto Studies Fondation (ESF)

La supre listigitaj partneroj morale subtenas la projekton, pere de siaj membroj partoprenas la formadon aŭ donacis stipendion por ontaj, nepagipovaj partoprenantoj, sed ili jure kaj finance ne respondecas pri la kurso kaj rilataj aferoj.

La virtuala platformo de RITE funkcios kadre de la retejo www.edukado.net, sur kies riĉa materialo kaj moderna tekniko baziĝas la disvolviĝo de la formado. E-duKati mem konstruigis kaj pagis la RITE-programon, financas la kunlaborantojn kaj pagas al la Fondaĵo edukado.net pro la uzo de la reteja spaco.

Fonto: <https://edukado.net/klerigejo/rite/prezento>

interlingvistiko kaj elektitaj prelegoj, entute 100 lecionoj. Kion tio signifas? Kiom ampleksaj estas tiuj lecionoj?

PATRICK: Jes, vi pravas. La kurso estas tre ampleksa: 100 lecionoj! Kiam mi komencis, mi dubis. Mi diris al mi mem: „Eble mi ne sukcesos!”, sed paŝon post paŝo mi sekvis la diversajn dosierojn kaj mi finis la tuton. Je la unua vido la kursaro aspektas nekredeble senfina, sed ĝi estas tute farebla se oni studas nur kelkajn horojn ĉiusemajne. Oni devas pacienci, havi memdisciplinon kaj bone organizi sin mem. Tamen mi substrekas, ke ĝi estas tute farebla, la amplekseco nepre ne devas malkuraĝigi homojn. La kurso estas serioza, profesinivela. Oni ne devas forgesi, ke ni lernas por instrui nian ŝatatan lingvon.

IPR: *Ni scias de Katalin Kováts, gvidanto de la trejnado, ke vi estas la unua finstudinto, kaj via fervoreco pelis ŝin fini ĉiujn lecionojn. Vidante la foton pri vi kun la dosieroj ni havas la impreson, ke vi vere laboregis. Kiom da tempo, kiom da laboro vi investis?*

PATRICK: Kiam mi aliĝis fine de 2013, la tuta materialo ankoraŭ ne estis preta. Estis „eksperimenta fazo”. Mankis literaturo kaj dudeko da metodikaj dosieroj. La tutan kurson estras nur unu persono kaj kompreneble la ritmo haltis plurfoje pro diversaj, sed kompreneblaj kialoj. Nun la kurso estas kompleta, do se iu diligente studas ĉiusemajne, li/ŝi povas fini post unu aŭ du jaroj.

IPR: *Estis multe da hejmtaskoj, vi devis kompili tekstojn, analizi metodojn, krei ekzercojn. Kiom da dokumentoj vi kreis? Kaj kio estos ilia sorto?*

PATRICK: Kiel en universitato aŭ en altlernaj kursoj (por ne timigi la estontajn kursanojn) estas teoriaj kaj praktikaj partoj. Luj fakoj antaŭvidas nur la teorian parton, metodiko kaj gramatiko entenas ankaŭ praktikajn partojn, kie oni devas krei materialon: ekzercojn, prezentaĵojn, tabelojn aŭ serĉi inter revuoj kaj literaturaĵoj gravajn gramatikaĵojn. Mi listigis miaflanke 83 aktivaĵojn dum la tuta kurso. Luj jam disponeblas en la sekcio „instrumaterialo”, aliaj aperos tie iom post iom. Dum RITE, ekzemple, mi lernis kiel fari „PowerPoint”-prezentaĵojn, mi neniam antaŭe faris tion, kaj ekde tiam mi ilin pretigas por mia laboro. Mi plibonigis miajn komputilajn konojn, ĉar por sekvi la kurson, oni devas uzi programojn, krei filmetojn, sonmaterialojn ktp.



IPR: *Kiuj estis viaj plej ŝatataj partoj, kaj kion vi ne ŝatis en la kurso?*

PATRICK: Se diri sincere, miaj plej ŝatataj partoj estis gramatiko kaj interlingvistiko. Mi ŝatis pli-malpli ĉion. Interesa parto estis frazeologio, eble ne tiom esenca por tia kurso.

IPR: *Ni scias, ke vi trapasis diversajn nivelojn kaj tipojn de la KER-ekzamenoj. Ĉu tio estis postulo de la RITEkurso? Kiel vi ekzameniĝis pri la lernitaĵoj? Kaj kio pri la praktika ekzameno, nome la modelleciono?*

PATRICK: Mi esperantistiĝis en 2011. Tiam mi lernis per reta kurso kaj poste mi iris al SES en Nitro. Tie mi aŭdis pri la KER-ekzamenoj kaj la sekvan jaron, ĉiam en Nitro, mi partoprenis la nivel-sesion B1. En 2013 mi trapasis en Liono la KER-B2 kaj meze de 2013 en Kastelaro dum la Itala Kongreso (la skriban parton) kaj komence de 2014 en Antverpeno (buŝan parton) mi akiris la nivelon C1. Mi pensis malsukcesi la parolan parton C1, mi vere timis la aŭdkomprenon, sed finfine mi sukcesis. Por sekvi RITE mi kredas, ke oni postulas almenaŭ la nivelon B2, mi legis tion en la koncerna paĝo.

Pri la RITE-lernitaĵoj post ĉiu leciono estas testo. Sukcesinte en ĝi oni povas antaŭenpaŝi, male oni devas ripeti la teston post unu tago. Koncerne la modellecionon mi devis skizi tri temojn kaj estis elektitaj du. Mi preparis du modellecionojn (argumenton, celon, tempon, programon, ekzercojn...) kaj de la du modellecionoj mi prezentis kaj filmigis unu. Mia temo estis rolludo (situaci-komunika metodo).

IPR: *Ni imagas, ke vi restos en laborkontakto kun edukado.net kaj Katalin, sed krom tio, kiel vi povos en via Esperanto-agado uzi la lernitaĵojn?*

PATRICK: Kompreneble mi esperas kunlabori kun ŝi kaj pretigi materialon por edukado.net kaj partopreni kiel onklo parolsesiojn ĉe EKPAROLU, sed tion mi faros post iom da paŭzo pro profesiaj kialoj. Intertempe ekde 2016 mi havis kursanojn en mia urbo kaj tiam mi komencis instrui. Du el miaj kursanoj aktoris en mia modelleciono. Tiun ĉi jaron mi sukcesis varbi kaj havi du diversajn kursojn (bazan kaj progresigan). Mi eĉ kreis fejsbukan paĝon „Genova Esperanto-klubo”. Des pli gravas mia agado, ĉar en mia urbo ne plu estas Esperanto-asocio. La plej proksima Esperanto-grupo estas 50 kilometrojn for.

IPR: *Edukado.net kune kun ILEI nun lanĉis mallongigitajn retajn trejnadon kaj la teorian parton oni kompletigos per ĉeestaj seminarioj en Madrido kaj en Kotonuo. La kursanoj studos nur metodikon kaj gramatikon. Ĉu vi bedaŭrus ne havi ĉiujn studobjektojn de RITE? Kion vi konsilas al tiuj, kiuj aliĝis al la mallongigitaj RITE-kursoj?*

PATRICK: Tio dependas de la kalendaro. Dum la RITE-studoj la tempo por studi estas pli fleksebla. En la du kursoj, kiujn vi menciis, eble pro diversaj kialoj, oni devis mallongigi la tuton. Laŭ mi RITE estas iomete tro ampleksa, sed ĝi donas vere kompletan rigardon pri la lingvo kaj pri ĝia kulturo. Ĉiuokaze, estus grave havi panoramon ankaŭ pri literaturo, movadhistorio kaj interlingvistiko.

IPR: *Ĉu vi ŝatus ion aldoni, pri kio ni ne demandis vin?*

PATRICK: Jes, mi nur deziras aldoni, ke estis bela sperto. Ne estas multaj lokoj, kie oni povas sekvi kursojn pri metodiko, interlingvistiko, gramatiko, frazeologio ktp.. Esperantistoj profitu je tio.

IPR: *Dankon kaj denove korajn gratulojn al vi, Patrick!*

Fonto: <https://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=281>

Konstanteno: ĉu vere granda kristana imperiestro?

I tala profesoro pri historio en la universitato de Orienta Piemonto, Alessandro Barbero, faras prelegon en Jutubo en la itala, ¹ kiu baziĝas sur lia libro *Costantino il vincitore* (Roma: Editrice Salerno, 2006).

Esence li diras, ke la konvertiĝo al kristanismo de Konstanteno estas duba. Por komenci: la fama “Edikto de Milano” ne donis formale al la kristanoj unuarangan pozicion inter la religioj de la imperio, sed simple asertis, ke ĉiu religio en la imperio havas la saman rajton esti sekvata.

La persekutoj kontraŭ la kristanoj jam estis ĉesintaj pli frue. Ili fakte jam ĉesis pro deklaro de antaŭa imperiestro, Kajo Galerio. Sed Konstanteno estis lerta politikisto, kiu bezonis la apogon de la popolo por akiri la pozicion de sola imperiestro. Konstatinte, ke kristanoj estas jam multaj, li decidis baziĝi sur ili kaj donis al ili amason da donacoj kaj privilegioj.

Cetere la konduto de Konstanteno tute ne estis kristana, ĉar li daŭrigis ankaŭ post Milano sian sangoplenan vojon al la kompleta regado de la tuta Romia Imperio. Tion li simple atingis per mortigado de la aliaj kunimperiestroj. En tiu historia momento la Romia Imperio estis dividita inter du imperiestroj kaj du subimperiestroj, nomitaj cezaroj.

Okaze de unu el tiuj mortigoj, tiu de la imperiestro Maksencio (Maxentius en la latina), laŭ la legendo okazis granda miraklo antaŭ batalo en Romo apud la ponto Milvio super Tiberio. Dio persone intervenis kaj Konstanteno kaj lia tuta armeo vidis en la ĉielo krucon kun la skribo “Per ĉi tiu signo vi venkos”. Certa pri la helpo de Dio, Konstanteno atakis kaj gajnis.

Nu, kio okazis en la realo? Neniu scias, sed la kristana historiisto Laktancio (Lactantius), kiu verkis tuj post la batalo, nur rakontas, ke en la nokto antaŭ la batalo Konstanteno havis sonĝon laŭ kiu, se li metos la nomon de Kristo sur la ŝildojn de la soldatoj, li gajnos la batalon. Laŭ Laktancio, matene Konstanteno rakontis pri la sonĝo al la soldatoj kaj metigis la nomon de Kristo sur la ŝildojn. Kaj tamen: 1) Ĉiuj generaloj en tiu tempo havis favoran sonĝon dum la nokto antaŭ la batalo kaj matene rakontis tion al la enviĝintaj soldatoj por kuraĝigi ilin. Cezaro faris, Aŭgusto faris, ktp. Do la sonĝo de Konstanteno estas unu el serio de tiaj sonĝoj. 2) Ekzistas multaj bildoj de la soldatoj de Konstanteno kun tre klare videblaj ŝildoj kaj sur neniu ŝildo estas la nomo de Kristo. Oni devas konkludi, ke temas pri invento de la kristana historiisto, por pravigi la helpon de Dio al Konstanteno.

Alia pli grava historiisto, Eŭzebo el Cezareo

(Εὐσέβιος τῆς Καισαρείας), kiu verkis post la morto de Konstanteno, rakontas la aferon alimaniere: Konstanteno vidis en la mateno, dum li estis sendorma, kune kun la tuta armeo, krucon en la ĉielo kun la citita skribo. Sed, en tiu epoko kruco ankoraŭ ne estis uzata de la kristanoj kiel sia plej grava simbolo, ĉar por la romanoj kruco estis malŝatinda ilo por mortigi krimulojn. Laŭ la propaganda vidpunkto ĝi ne estis uzinda. Ilia simbolo estis la komencliteroj de la vorto Kristo en la greka.

Eŭzebo ne hezitas rakonti, ke li aŭdis tiun rakonton de la maljuna Konstanteno mem, kiu ĵuris, ke ĝi estas vera. Evidente ankaŭ Eŭzebo havis intereson glorigi Konstantenon por glorigi la eklezion. Lia malfrua rakonto troviĝas en la libro *Historio de la eklezio*. Sed kiel povas esti, se miloj da homoj vidis tiun krucon en la ĉielo, ke neniu alia historiisto aŭ verkisto parolas pri tio post la batalo?

Entute, ne fidu miraklojn, same kiel vi ne fidus min, se mi rakontus al vi, ke ĉi-matene mi vidis verdan stelon en la ĉielo kun la skribo “la fina venko estas proksima”. Krome atentu, ke nuntempe iuj televidaj kanaloj en Usono sukcesas kredi al la usonanoj, ke ili ne volas san-servon. En la pasinteco eĉ sen televido la potenculoj sukcesis konvinki la popolon pri neokazintaj aferoj, kaj ankoraŭ nun en katolikaj landoj oni rakontas pri Konstanteno kaj la kruco en la ĉielo.

verkis **Renato Corsetti**, el Britio

¹ <https://www.youtube.com/watch?v=Muo8amNew0&t=5099s>



*La Arko de Konstanteno en Romo, Italio (315 p.K.)
(Foto de: David McSpadden)*


Fonto: **Ateismo** #25, novembro 2017

Se oni ne sciis pli bone, oni facile havas la impreson ke la Suno ĉirkaŭiras la Teron. Tiun ideon oni havis dum miljaroj. Kvankam kelkaj filozofoj jam proponis ke la Tero ne estas la centro de la universo en antikveco, pli el ili kredis la malon, do la ideo ne multe disvastiĝis ĝis post la mezepoko. Eble la demando de kio ĉirkaŭiras kion ne ŝajnas tiom grava unuavide, sed dum la plejparto de historio, la "moviĝo" de la Suno estis la plej grava horloĝo. Dum la tago ĝi regis kiam oni vekigis. Dum la jaro ĝi regis kiam oni semis kaj rikoltis. Plej sukcesaj estis do tiuj komunumoj, kiuj komprenis la Sunon.

Laŭ la Greka mitologio, la mondo estas ĉirkaŭata de oceano. Ĉiumatene, la dio Helios leviĝas el la oceano kun sia ĉaro kaj tiras la Sunon laŭ la firmamento. En la okcidento li denove eniras la oceanon kaj vojaĝas orienten per boato. Nuntempe la ideo de tiri la Sunon per ĉaro estas tute freneza, sed la Grekoj havis neniun ideon pri kiom granda la Suno estas, aŭ pri ĝia distanco. La filozofoj foje havis pli raciajn ideojn pri la moviĝoj de astroj, sed ili ne povis bazigi siajn ideojn sur pli ol filozofio kaj la propraj okuloj. La plej grava el la tiamaj modeloj estis tiu de Aristotelo. Laŭ li, la universo konsistis el du partoj: la "subluna" kaj la "superluna". Aristotelo kredis ke ĉio super la Luno estas perfekta kaj ne ŝanĝiĝas. La Luno kaj ĉio super ĝi do moviĝas laŭ cirkloj, ĉar Aristotelo konsideris la cirklon la perfektan formon. La Lunoj kaj la planedoj ĉiuj estis fiksitaj al rotaciantaj, travideblaj sferoj, kiuj ĉiuj havis sian propran rapidecon. La centro de ĉiuj sferoj estas la Tero kaj la plej ekstera sfero surhavas ĉiujn stelojn.


Kelkfoje planedoj faras nodon kaj moviĝas retroen. Kompreneble tio signifas ke ne ĉio moviĝis laŭ la perfekta formo kiel Aristotelo diris. Por ripari la damaĝon, Apolonio de Pergo ĝisdatigis la modelon kaj poste aliaj filozofoj kiel Ptolemeo eĉ pli detale ellaboris ĝin. La granda ŝanĝo kiun ili faris estis la aldono de epicikloj. La planedoj ne moviĝis laŭ unu cirklo, sed laŭ cirklo, kies centro moviĝis laŭ alia cirklo. Kiam Ptolemeo finis la modelon, ĝi havis 40 cirklojn kaj epiciklojn. La centroj de la cirkloj ne plu estis en la centro de la Tero kaj la epiciklo de la Luno iris en la malan direkton. Ju pli da cirkloj oni aldonis, des pli kompleksa la sistemo iĝis, sed esence ĝi estis facile priskribebla.

Kvankam kelkaj Grekaj filozofoj jam eksperimentis kun suncentrismaj modeloj, bonaj matematikaj priskriboj nur venis post la mezepoko. Tiam Koperniko proponis suncentrisman modelon en sia libro "De revolutionibus orbium coelestium" (Pri la turno de ĉielaj sferoj). Li longe hezitis publikigi la libron, pro tio ke ĝi



^ Simpligita Ptolemea sunsistemo. En lia modelo, la Suno ne havas epiciklon kaj la Luno iras en la mala direkto.


kontraŭis la Aristotelan modelon, kiu tiom longe travivis kaj estis subtenata de la papo. Daŭris ĝis tuj antaŭ lia morto ke Koperniko publikigis la libron. La socia ŝoko ne estis tiom granda kiel Koperniko timis tamen, pro tio ke la presisto aldonis antaŭvorton ekster lia scio, en kiu li diris ke la teorio estu konsiderata kiel ebla matematika modelo, anstataŭ nepre ĝusta priskribo de realeco. Kvankam ni nun scias ke la Tero ĉirkaŭiras la Sunon, la priskribo de Koperniko ne estis tiom kredebla. Unue, Oni ĉiam pensis ke ĉio falas al la Tero. Koperniko proponis ke anstataŭe, ĉio kio apartenas al la Tero falas al la Tero, ĉio kio apartenas al la Suno falas al la Suno kaj tiel plu. La teorio de gravito de Neŭtono ankoraŭ ne ekzistis, do tiu propono estis ankoraŭ malfacile kredebla. Due, Koperniko ankoraŭ kredis, ke ĉiuj astroj moviĝu en cirkloj. Por priskribi suncentrisman



^ Mapo de la sunsistemo, bazita sur Aristotelo

La ideo de ĉielaj sferoj estas bela, sed kiam oni rigardas dum pli longa tempo, ĝi ne plu funkcias.

sistemon, li bezonis eĉ pli da epiciklojn ol Ptolemeo por tercentrisma sistemo, do tio igis la modelon eĉ pli kompleksa. La lasta granda kritiko temis pri paralakso. Kiam oni moviĝas, oni vidas ke proksimaj objektoj ŝajnas moviĝi pli rapide ol malproksimaj objektoj. Tion oni povas vidi en aŭto, kiam oni tre rapide preterpasas konstruaĵojn tuj apud la vojo, sed montoj en la fono ŝajnas iri tre malrapide. La kritiko estis ke se la Tero moviĝus ĉirkaŭ la Suno, oni vidus ke la steloj moviĝus unu kompare al la alia. Koperniko defendis sian teorion per tio ke la steloj estas tiom nekredible distancaj, ke oni ne povas mezuri la efikon kaj li pravis. Neniu kapablis mezuri la paralakson de steloj ĝis la naŭdeka jarcento, sed la efiko ja ekzistas.



Simpligita Kopernika sunsistemo kun la Tero (Terra) inter Venuso kaj Marso


Venuso estis gravaj. Ĉirkaŭ Jupitero li malkovris kvar lunojn, kiuj klare moviĝis ĉirkaŭ Jupitero anstataŭ la Tero. Venuso ne havas lunon, sed pro tio ke ĝi pli proksimas al la Suno ol la Tero, oni povas parte vidi la malhelan flankon. Oni neniam vidas la malhelan flankon de planedoj kiuj estas malpli proksimaj al la Suno. Eble la plej grava ŝanĝo por igi la Kopernikan modelon funkcii estis farata de Keplero. Li faris sennombre multajn observojn de la pozicioj de la planedoj kaj provis kalkuli iliajn orbitojn kun lia lernanto. La rezulto de tiu giganta esploro estis tri leĝoj pri kiel planedoj moviĝas. Post tiam, eĉ la ideo, ke planedoj moviĝis en cirkloj estis forĵetata.

1. Ĉiuj planedoj moviĝas ĉirkaŭ la Suno en elipsaj orbitoj. Elipso estas kurbo ĉirkaŭ du punktoj (la fokusoj), el kiu unu ĉiam troviĝas en la Suno.
2. Planedo bezonas same multe da tempo por trairi du sektorojn de sia orbito kun la sama areo. Tio signifas ke ĝi plirapidiĝas kiam ĝi alproksimiĝas al la Suno kaj malrapidiĝas kiam ĝi malproksimiĝas.
3. La tempo bezonata por trairi la orbiton al la dua potenco, dividite de la averaĝa distanco al la Suno al la tria potenco, estas konstanta. Tio signifas ke planedo kiu averaĝe estas dufoje tiom for de la Suno

kiel la Tero, bezonos ĉirkaŭ 2,8 jaroj por ĉirkaŭiri la Sunon.

Kvankam la leĝoj tre bone funkciis, ili ankoraŭ ne estis kompletaj. Estis Neŭtono kiu ligis la teoriojn pri la moviĝo de planedoj al la moviĝoj de objektoj surtere. Tiel li do igis la distingon inter la "subluna" kaj la "superluna" nenecesa. Kvankam pluraj versioj ekzistas, la anekdoto pri kiel li elpensis tiun paŝon iris pli-malpli jene. Kiam Neŭtono sidis sub arbo kaj pensis pri fiziko, li vidis pomon fali de arbo. Li scivolis pri kio tiris la pomon kaj decidis ke iu forto devus esti respondeca pri tio. Tiu forto estis la forto de gravito. Se la forto de gravito povas tiri la pomon sen tuŝi ĝin, li pensis, kial ĝi ne povus tiri ankaŭ la Lunon? Kompreneble tio nur estis la komenco, sed kiam li ellaboris la teorion, li povis unuigi moviĝojn surtere kaj en la kosmo kaj kreis unu el la plej fortaj teorioj el la historio de scienco. Ĝis la dudeka jarcento la gravita teorio de Neŭtono estis senprobleme uzata, ĝis oni eltrovis ke ĝi ne funkcias en la plej ekstremaj situacioj. Oni bezonis la relativeteorion de Einstein por priskribi ŝanĝiĝojn en la orbito de Merkuro. Al li, gravito ne estis iu forto kiu tiras objektojn, sed faldiĝo de spaco mem, kaŭzata de grandaj masoj. Merkuro, kiu plej proksimas al la Suno, do estas plej multe influata de tiuj efikoj.

Sonas kvazaŭ oni nur bezonas unufoje kalkuli la orbiton de planedo por ĉiam perfekte scii la tempon, sed ankaŭ tio nur estas ŝajno. La




Laŭ Keplero, planedo bezonas same multe da tempo por iri de A al B, kiel por iri de C al D, ĉar la areoj estas same grandaj.

Tero estas la ludpilko de la astroj ĉirkaŭ ĝi kaj la Luno, Suno kaj planedoj konstante ŝanĝas ĝian orbiton kaj rotacirapidon. La moviĝo de la Tero estas tiom kompleksa kaj malregula, ke homaro decidis ne plu aŭskulti ĝin. La sekundo ne plu estas difinita kiel parto de tago, sed anstataŭe kiel la daŭro de 9.192.631.770 periodoj da radiado de ¹³³Cs-izotopo. Tio signifas ke oni pli fidus la aparatojn kiujn ni kreis, ol la Tero. Malgraŭ tio, ja volas ke la pozicio de la astroj kongruu kun nia Tempo, oni uzas supersekundojn, same kiel supertagojn, por nuligi la diferencon inter la du.

Ĉiukaze la ideo de Tago ne estas universala. Ekzistas pluraj difinoj de tago, kiuj havas siajn proprajn utilojn. Tago estas la periodo dum kiu la Tero unufoje ĉirkaŭiras sian propran akson. Tiu difino ŝajnas logika, sed ĝi dependas de onia vidpunkto. Kiam oni elektas forajn stelojn kiel referencpunkton,

tago daŭras 86 164 sekundojn. Tio nomiĝas "sidera tago". Alia difino uzas la kruciĝon de la ŝajnorbito de la Suno kaj la ekvatoro kiel referencpunkton, sed ankaŭ tiu punkto malrapide moviĝas, kio igas tiun difinon de tago ĉirkaŭ 8 milonoj de sekundo malpli longa. Se oni anstataŭe uzas la Sunon kiel referencpunkton, kio estas la ĉiutaga difino, la tago daŭras iom pli longe, pro tio ke la Tero ankaŭ ĉirkaŭiras la Sunon, do ĝi iom pli longe turniĝu por ke la Suno estu en la sama punkto. Tio ankaŭ signifas ke jaro daŭras unu tagon pli se oni mezuras per sideraj tagoj. La plej facila maniero por kompreni la diferencon inter la du difinoj estas ke oni mezuras la tempon inter la momento kiam stelo havas specifan pozicion kaj kiam ĝi havas la saman pozicion la



^ Kiam la Tero tute rondiris (2), la Suno ne estas en la sama loko kompare al la surfaco.

sekvon tagon. Tiu periodo estas (praktike) sama por ĉiuj steloj krom la Suno, ĉar ĝi malrapide moviĝas trans la konstelacioj.

Aldone, se oni ĉiam samtempe fotas la sunon, ĝi ne ĉiam estos en la sama pozicio. La orbito de la Tero estas elipsa, do

ĝi ne ĉiam havas la saman rapidon. Aldone, la turnakso de la Tero ne havas rektan angulon kun ĝia orbito. Tio signifas ke kiam oni fotas la sunon je la sama tempon dum tuta jaro, la pozicioj de la Suno ne estas punkto aŭ rekta linio, sed kurbo kun nodo en la mezo. Tia kurbo nomiĝas "analemo" kaj ĝi havas malsaman formon sur ĉiu planedo. Sur Saturno, Urano kaj Neptuno la analemo havas la formon de la numero 8, kiel surtere (kvankam tiu de Saturno preskaŭ havas la formon de guto). Sur Jupitero kaj Venuso ĝi estas elipso, sur Marso ĝi estas guto kaj sur Merkuro ĝi estas punkto. Tiu de Merkuro estas punkto, pro tio ke tago sur Merkuro daŭras ekzakte 1,5 foje tiom longe kiel jaro.




^ Analemo kun la datoj de la plej ekstremaj punktoj

La angulo de la Terakso ne nur kaŭzas la formon de nia analemo. Ĝia plej granda efiko sur la Tero estas la sezonoj. Pro la angulo, unu flanko de la Tero ricevas pli da sunlumo ol la alia flanko, kio kaŭzas ke tiu flanko

spertas someron. Aldone, la tagoj iĝas pli longaj sur la parto de la Tero kiu spertas someron kaj malpli longaj sur la alia parto. Ĉi-momente, fine de junio, la norda duonsfero ĵus spertis sian plej longan "tagon" (la tago kun plej da sunlumo), sed tio ne ĉiam estos tia. Pro tio ke la tero estas pli peza ĉirkaŭ la ekvatoro, la Suno provas rektigi la turnakson. Ke la Tero rotacias samtempe ŝanĝas la direkton de tiu forto, kio kaŭzas ke la turnakso de la Tero malrapide turniĝas. Tiu moviĝo nomiĝas "precesio" kaj daŭras ĉirkaŭ 26 000 jaroj. Tio sonas kiel ignorebla faktoro, sed la steloj kiujn la Grekoj kaj Egiptoj uzis por navigacii estis en tute malsamaj lokoj. Nun ekzistas stelo preskaŭ tuj super la turnakso de la Tero, kiu do ne moviĝas, sed tio ne ĉiam estis tia. Interesa konsekvenco de tio temas pri konstelacioj. La konstelacio kiun oni havas en horoskopoj ne plu ĝustas. Laŭ la difino, onia konstelacio estas tiu konstelacio, en kiu la Suno troviĝas dum onia naskiĝtago. Tio funkciis kiam oni elpensis la konstelaciojn en antikveco, sed pro la pecesio, la zodiako ŝoviĝas averaĝe unu konstelacion ĉiuj 2000 jaroj. Tio signifas ke oni jam devas enkalkuli tiun ŝoviĝon oni legas horoskopon. Tio ne igos la horoskopon pli vera tamen.

La historio de kapti la tempon estas same aĝa kiel historio mem. Ĝi estis granda defio kun multe da bataloj. Unuflanke sciencistoj kiel Galileo estis malliberigitaj pro tio ke iliaj ideoj ne kongruis kun religio, sed aliflanke religiaj festotagoj kaj la strukturita ritmo de monaĥoj instigis la konstruadon de precizaj kalendaroj kaj horloĝoj. Unuflanke homaro iĝis pli preciza ol la naturo, sed aliflanke oni ja volas ke la horloĝoj kongruu kun la moviĝo de la Tero. Ĉiukaze, la historio ankaŭ estas verkata. Novaj teĥnologioj helpas onin mezuri eĉ pli precize kaj oni pli kaj pli bone komprenas kiel la Tero moviĝas. Horloĝoj do ne estas memevidentaj.



^ Precesio igas la Tero moviĝi kiel turbo.

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/06/27/la-ludpilko-de-la-universo/>

Facilaj rakontoj

La mistera amanto *

Bela junulino havis nek edzon, nek patron, nek patriron, nek fratojn, nek fratinojn, nek iu ajnparencojn. Ĉiuj jam mortis. Do, ŝi loĝis en kabano, ekster vilaĝo, proksime de arbaro kaj neniu vizitadis ŝin.

Unu vesperon, bel-aspekta vaganto frapis sur ŝian pordon: „Mi estas vaganto. Mi vojaĝis longtempe en multaj landoj. Lasu min ripozi ĉi tie. Mi vere ne povas piediri plu.“

La junulino diris: „Nu, ripozu. Mi povas disponigi al vi matracon. Kaj ĉu vi deziras manĝi aŭ trinki ion?“

Li manĝis kaj trinkis kaj baldaŭ li kuŝiĝis sur la matracon, dirante:

„Nun vere mi dormos denove, mi ne dormis dum longa tempo.“

„Kiom longe?“

„Ĉarmulino, mi dormas nur unu semajnon dum jarmilo.“

La junulino ridis. „Kia ŝerco! Vi vere estas amuza blagulo!.. He, li jam endomiĝis.“

Leviĝinte matene la vaganto diris: „Vi estas tre bela junulino. Se vi permesos, mi povos resti kun vi ĉi tie dum tuta semajno.“

Ŝi jam amis lin, tiel belaspektan kaj bonhumoran kaj volonte ŝi konsentis.

Pasis tago kaj nokto kaj tago.

Meze de la nokto la junulino vekiĝis kun krio kaj

vekis karulon.

„Ho, mia kara! Mi havis tre malbonan sonĝon. Mi sonĝis, ke vi estas malvarma kaj blanka kaj ni veturas kune en belega kaleŝo. Sed trenis ĝin ne ĉevaloj, sed ses blankaj birdoj. Vi prenis grandan kornon kaj ludis strangan melodion kaj alvenis grupo de mortintoj kaj ili akompanis nin. Vi estis ilia reĝo.“

Li diris nur: „Estis tre malbona sonĝo.“

Sed baldaŭ li leviĝis.

„Kara knabino, mi devas foriri. Dum longa tempo neniu mortis tra la tuta mondo. Adiaŭu min.“

La junulino ekploris: „Kial? Ne, kara, ne foriru. Restu kun mi!“

„Dio vin protektu! Mi nepre devas foriri.“

Li etendis sian manon por adiaŭi, sed ŝi kaptis ĝin, ploregante: „Kara, kara viro, kiu vi estas?“

„Tion scii, estas morti.“

„Diru al mi, kiu vi estas!“

„Vane vi demandas. Mi ne diros al vi, kiu mi estas.“

„Kara, mi estas preta suferi kun vi, sed nur diru al mi vian nomon.“

„Do, bone. Vi venos kun mi. Mi estas Morto.“

La junulino unufoje tremegis kaj mortis.



* Cigana fabelo el libro **Faktoj kaj Fantazioj** de **Marjorie Boulton**

La 12-a MONA Kunveno



Kelkaj pensas, ke UEA estas nederlanda hipopotamo (cetere, malofta kaj estingiĝanta besto-speco), sed en la realo ĝi estas gazelo kuranta en la dezertoj de Irano. Kunkuru, membriĝu, donacu, sed ĉefe informu pri Esperanto kaj instruu ĝin. Ĉio cetera estas fest-paroladoj.



Malfermiĝas la aliĝoj al la 12-a Mezorianta Kunveno en Irano. Legu ĉiujn informojn en :

https://uea.org/vikio/La_dek-dua_Mezorienta_Kunveno_en_Irano

Komisiono MONA

Jam eblas aliĝi al la 12-a Mezorianta Kunveno okazonta de la 28-a al la 31-a de marto 2019 en Kaŝano - كاشان - Irano sub la temo "La Esperanto-movado en Meza Oriento kaj Norda Afriko". UEA gratulas la lokajn aktivulojn de Irano kaj sian Komisionon pri Meza Oriento kaj Norda Afriko pro tio. La mondo vin deziras sukceson!

UEA



Solve de la krucvort-enigma